

Reveninte hejmen post unumonata restado en la suna Nepalo, kie laŭ la loka kalendaro homoj vivas en la jaro 2065 (ĝi estas komplika, sun-luna kalendaro!), mi tre malfacile readaptiĝas al la nuna vivo: pluvoza kaj kotoza vetero, grizaj kaj nigraj koloroj surstrate... Malvarmas. Pluse, la iam kutima manĝo kirligas en la stomako kaj rezistas esti digestita...

Jam de kelkaj jaroj mi sopiras pri Azio. Ĝi pli kaj pli altiras min. De post la unumonata vizito al Ĉinio en 2004 kaj la pasintjara vojaĝo al Japanio mi intencis priskribi miajn impresojn, sed post revenoj mi ne retrovadis ĉu tempon, ĉu inspiron, ĉu vortojn por noti la fabelecon kaj mirindajn rememorojn, kiujn lasas landoj, kies ekzotikecon ni imagas laŭ legitaj libroj, artikoloj en la amaskomunikiloj, radiokaj televidelsendoj, laŭ rakontoj de aliaj personoj.

Kial mi elektis Nepalon? La ideo veturi tien venis iom subite. Mi konis persone 3 nepalanojn laŭ la antaŭaj internaciaj E-renkontiĝoj, aŭskultis iliajn prelegojn pri la lando. Post la tralego de kelkaj pliaj informoj pri Nepalo mi plifirmiĝis en la decido malkovri ankoraŭ unu azian landon. La Interreto multe helpas al iu ajn vojaĝanto: post ioma serĉado mi trovis oficejon en Moskvo, en kiu mi mendis rete kaj sekve elaĉetis la flugbileton per la pakistana flugkompanio PIA al Katmandu. Pri la vizo problemoj ne aperis, ĉar laŭ la informo de nepala ambasado en Moskvo ĝin eblas facile akiri en la flughaveno de la nepala ĉefurbo. Ankaŭ la reta kontakto kun nepalaj geesperantistoj estis pozitiva. Ili pretas akcepti min. Kun grandega deziro iom ekkoni Nepalon mi startas. Aliaj ja sukcese vojaĝas...

La formalajoj en la aerhaveno de la nepala ĉefurbo okupas iom da tempo: enketilo plenigita, foto algluita, vizo pripagita – antaŭen! Mi eliras eksteren kaj atente observas homamason. Neniun, similan al renkontanta min, personon mi rimarkas. Mi komencas iom nervoze cerbumadi pri la situacio... Tamen, jen de alia flanko de la strato en homamaso mi rimarkas iun, kiu kvazaŭ atentis min kaj faras geston. Ankaŭ mi ĝoje mansvingas kaj iras renkonten. La renkontanto estas Razen (oficiale – Rajendra) Manandhar, 38-jaraĝa ĵurnalisto, prezidanto de Nepala E-Asocio kaj mia gastiganto. Li ne tuj rekonis min pro iom ŝanĝita frizaĵo, kiun mi plikurtigis antaŭ la veturo al varmego klimato. Do, ni enaŭtiĝas al iu malnova (kiuepoka?) taksio kaj provas starti. Sed nia veturilo estas tiom olda, ke ĝia motoro ekfunkcias nur post kelkaj tusoj, muĝoj kaj supozeblaj petegoj aŭ admonoj de ĝia mastro.

La hejmo de Razen troviĝas en la suda urboparto ĉe borde de la rivero Bagmati. La trinivela ruĝbrika domo kun balkonetoj kaj ampleksa teraso, sur kiu en la granda kaŝo loĝas kelkdeko da gaje pepantaj birdetoj, lasas agrablan impreson kvazaŭ pri domo de iu burĝo okcidentlanda aŭ de novrusiano. La unua etaĝo estas luigita al 4-persona familio. Kiel mi poste eksciis, multaj domposedantoj en Katmandu kutimas luigi parton de siaj domoj. En la sufiĉe vasta domo de Razen, finkonstruita antaŭ kelkaj jaroj je banka kredito, mebloj ne multas. Tamen ili sufiĉas por servi al la 3-persona familio, kiu aŭtune pligrandiĝos. La edzino de Razen, Ŝeĉja, ankaŭ ĵurnalistino, estas vigla kaj bonsana por daŭre mastri la domon antaŭ nasko de la dua infano. La unua, Ĝibu, 5-jara rondvizaĝa ridetanta petolulo, plengas la domon per siaj krioj, kantoj, ludoj. Li estas knabeto ne nur saĝa, sed ankaŭ

helpema kaj amikema. Por kontakti min li pretas kompreni miajn gestojn kaj ellerni kelkajn Esperantajn vortojn kaj frazojn.

La gastoĉambro, en kiu mi loĝos, vasta kaj sunplena, havas 3 fenestrojn kaj same malplenas je mebloj. Komforta, sufiĉe larĝa lito akceptis jam multajn geesperantistojn – gastojn de Razen. Dum mia vojaĝo mi havis okazon viziti kelkajn hejmojn de nepalanoj, precipe de geesperantistoj. Plejparto da ili similis iom al la domo de Razen. Do, pravas Razen, dirinte, ke eksterlandanoj havas neĝustan imagon pri la vivo de nepalanoj. Sed ekzistas, memkompreneble, pli modestaj hejmoj, konsistantaj el 1-2 ĉambroj.

La impresoj pri unuaj tagoj en Katmando ŝokas: malbonodoras ĉiejetitaj kaj akumuligintaj rubaĵoj, almozuloj, precipe el Hindio, kaj tre forta polucio, homoj lavantaj vestaĵojn kaj banantaj sin surstrate ĉe akvopumpiloj. La rivero Bagmati, en ĝia urba parto, timigas per sia malpureco...



Esperanto-domo en Katmando

energio, bezonata por spirita evoluo de la homaro.

Katmando, tute certe, moderniĝas kaj jam ne tre similas al tiu, kiun priskribis Tibor Sekelj en sia libro “Nepalo malfermas pordon” precize antaŭ 50 jaroj. Meze de la pasinta jarcento tute mankis aŭtomobiloj. Nun sur stratoj abundegas busoj, motorcikloj, diversgrandaj kaj luksaj aŭtoj, produktitaj en Japanio kaj Hindio. La livflanka trafiko estas sufiĉe intensa, sed ĝi okazas samtempe kaj al ĉiuj direktoj! La ŝoforoj scipovas stiri. Tamen scioj pri konduto dum la stirado tute forestas: aŭtoj veturas unu renkonten al alia kaj nur lastmomente evitas kunpuŝiĝon. Samtempe ŝoforoj signalas senĉese. Sur veturvojoj tute mankas dividstrioj de trafikordigo. Tial dekomence ĉeestas timo jen-jen trafi akcidenton. Aŭtoj, busetoj, motorcikloj, rikiŝoj, biciklistoj kaj... surstrate irantaj bovinoj, sanktaj bestoj en Nepalo, – ĉio miksiĝas en ĥaosa torento, sonoranta, krianta, konstante signalanta,

fojfoje muĝanta. Pluse, en la tuta ĉefurbo ekzistas nur ĉirkaŭ 10 trafiklumoj, kiuj ne ĉiam funkcias pro manko de elektro. Du fojojn semajne dum po du horoj vespere forestas lumoj ankaŭ en hejmoj de nepalanoj. Adaptiĝinte kun tempopaso, mi jam akceptadis la lokan vivmanieron, kiel kutimam.



Neniu turisto preterlasas viziton al la turisma kvartalo Thamel, kie abundas butikoj kun diversaj varoj. Ĉio – por eksterlandanoj, kiuj vere ne svarmas somere. Somero estas periodo de musonoj. Mirige, sed ĉi-aŭguste pluvegis fakte nur nokte. Singarde, iom timeme kaj ne tre proksimiĝante al butikoj mi observas eksponitajn varojn. De ĉiuj flankoj sonas “Namaste!” (Saluton!). Mi reciprokas “Namaste!” kaj provas nepalstile kunmeti manplatojn je brustonivelo. Ekaŭdinte la respondon, alkroĉemaj vendistoj insiste proponas eniri iliajn butikojn kaj aĉeti tiun aŭ tiun ĉi aĵon kontraŭ bona, laŭ iliaj vortoj, prezo. Diverskoloraj naciaj vestaĵoj kaj tapiŝoj, virinaj ornamaĵoj kaj kupraj metivaroj, religiaj maskoj kaj bonodorigaj incensoj, varmaj vestaĵoj el lano de gruntoj kaj sportaj ekipaĵoj por montgrimpado – ĉio estas je la dispono! Vendistoj de lignaj memfaritaj violonoj ludas ĉe mia orelo proponante aĉeti muzikilojn, rikiŝoj haltas antaŭ mi barante la vojon kaj iliaj posedantoj pretas veturigi min ien ajn, ŝupurigistoj proponas poluri aŭ kolorigi per nigra vakso miajn ŝuojn, kies koloro estas tute alia, akvovendistoj laŭte kiantaj “pani-pani” (akvo-akvo) ŝovas al miaj manoj botelon da akvo neglektante mian deziron: la vivo kirliĝas – bunta, multfaceta, ankoraŭ enigma kaj tiom alloga!

La tagon de mia alflugo venis al Katmando ankaŭ bone parolanta esperantisto el Turkio, Murat Ozdizdar. Kun sia amiko, neesperantisto, li iom vojaĝis tra Hindio kaj jen por unu semajno duope ili venis al Nepalo. Pro malmultaj restadtagoj en Nepalo la turkoj volas senprokraste veturi al Chitwan (Ĉituan), konata nacia reĝa parko en subtropika regiono. Leginte antaŭe pri tiu ĉi loko mi volas profiti la okazon kaj aliĝas al la formiĝanta grupeto. Sed antaŭe mi devis ŝanĝi devizojn al nepala mono: rusiaj rubloj ne akcepteblas. Razen helpas por ke mi ne eraru (aŭ ke oni ne trompu min!?). Farite! La speciale kunprenita monujo nun plenplenas je diversvaloraj monbiletoj: malpuraj, parte ŝiritaj kun koloroj preskaŭ jam malaperintaj. La kurzo de nepala rupio ne estas stabila kaj ŝanĝiĝas ĉiutage.

La sekvantan tagon Razen pretas akompani min al la startonta buso kaj proponas veturigi min... per motorciklo. De tiu momento mi jam lerte surrajdadis la motorciklon de Razen dum niaj multnombraj veturoj tra Katmando kaj eksterurben.

Forlasante perbuse (trajnoj ne ekzistas en Nepalo) la urbon, jam frumatene ni spertis aŭtoŝtopiĝojn kaj fortan polucion. Tamen, kiam la sufoka urbo restis malantaŭe, ni ekĝuis belegajn montarajn pejzaĝojn kaj freŝan aeron, kiu penetradis tra

malfermitaj fenestroj. La vojo serpentumas en Himalajoj, majestaj kaj pitoreskaj. Nepalo famas pro ili. En tiu ĉi lando troviĝas 8 el la 14 la plej altaj montoj en la mondo, el kiuj distingiĝas Everesto kun siaj 8848 m. Iom pli poste la montoj finiĝis. La buseto nun trankvile rulas inter palmoj kaj aliaj sub- kaj tropikaj arboj kaj arbustoj. Neatendite la buseto haltas. Ni ne estas solaj, kiuj ne povas plu veturi. Pli ol cent aŭtoj, busoj, ŝarĝaŭtoj estas blokitaj pro strikantaj homoj. Ĝajne, porlonge. Evidentiĝas, ke estas leninistoj-maŭistoj, kiuj bruligis kelkajn arbustbranĉojn kaj pajlon, barante la vojon. Ili mem staras apude kaj elkrias sloganojn. Do, post certa pripensado ni prenas niajn dorsosakojn, lasas la buseton, trairas piede parton de la barita vojo kaj poste luas 2 rikiŝojn por atingi nian celon. Veninte al la restadejo ni enhoteliĝis.

Posta restado estis laŭplana: ni vizitis antikvan vilaĝon, kie domoj estas faritaj el argilo kaj surstrate klukas kokinoj, ĉe vojrandoj en malpuregaj flakoj kontente kuŝas bubaloj. Ĝus pasinta pluvego plenigis ĉiujn eblajn kaj maleblajn survojn kaj kavojn kaj kavetojn per akvo, kiu miksiĝante kun argilo kaj tero prezentiĝas malbonodore kaj malagrabla. Ni provas transsalti ilin, sed ne ĉiam sukcesas. Niaj piedoj certe malsekiĝas, sed ni daŭre paŝas preĝante ne ĉerpi iujn nedeziratajn vermojn kaj insektojn. Krome ni havas okazon navigi kanue sur apuda rivereto. Sur arboj de la preterkurantaj bordoj videblas saltantaj de branĉo al branĉo simioj, super ni – ekzotikaj belaj birdoj, enakve trankvilas krokodiloj: iu – nutras sin per fiŝoj, alia – per viando. Rezigni promenon tra ĝangalo estus malsaĝe: ni ja venis por esplori ĉion, kion oni proponas al turistoj! Nia ĉiĉerono instruktas nin: se vi ekvidas rinoceron, grimpu tre rapide surarben aŭ kuregu malantaŭ arbon, se rinoceroj estas du, akcelu grimpadon, se vi ekvidas tigron, agu..., se vi ekvidas himalajan urson... ktp, ktp. Feliĉe, ke ni sukcesis ricevi porcion da adrenalino nur de nekutimaj floroj, grandegaj arboj, termitejoj kaj vermoj, kiuj ne preterlasis la okazon suĉi nian sangon. La pinto de nia restado estas vizito al elefanta farmejo kaj surele-



fanta rajdado, kiu daŭras preskaŭ 3 horojn tra sufiĉe profunda ĝangalo kaj rivereto. De la alto de duetaĝa domo ni, finfine, ekvidas rinocerojn, cervojn kaj strutojn, kiuj libere paŝtiĝas sur arbarkampetoj de nacia parko kaj preskaŭ ne atentigas nin.

Neforgeseblan impreson lasis lastvespera koncerto de loka popolgrupo. Konsistanta nur el junuloj, ĝi prezentas kantojn kaj dancojn de Tharu-etno, ritmajn tamburajn melodiojn en loka "Kulturdomo". Krom tradiciaj dancoj estas prezentita ankaŭ ridiga danco en kostumo de struto. Belege!

Reveninte al Katmando mi ĉeestas Elecionon por komencantoj en iu turisma agentejo. Ĝin gvidas Sree Pokharel (Sri Pokharel), kiun mi ekkonis dum ILEI-konferenco en

Japanio. Sree tre fervore instruas kaj mem daŭre lernas la lingvon. Mi intervenas, respondas demandojn de kursanoj, helpas pliĝustigi la prononcon de la lernantoj: certaj Esperantaj sonoj mankas en nepali-lingvo. Poste ni partoprenas la kunvenon en la E-domo. Murat rakontas pri agado de gesamideanoj en Istanbulo kaj Turkio ĝenerale, kie mankas ankoraŭ tutlanda E-organizaĵo, kaj pri la okazonta printempe 2009 unua kongreso de Mezoriantaj esperantistoj. La kunveno finiĝas per komuna kantado de ĉeestantoj, al kiuj mi lernigas E-kanteton.

La konatiĝon kun Katmando mi daŭrigas ĉiujn sekvajn tagojn, malkovrante ĉu sola, ĉu kun helpo de Razen intereseajn aspektojn de la urbo kaj de la vivo de nepalanoj. Stupaojn, specifajn konstruaĵojn oni vidas multajn en Nepalo. Ili estas sonorilformaj monumentoj, objektoj de adorado, kiuj simbolas ĉiujn mondopartojn kaj reprezentas la originan budhismon. En okcidenta parto de la ĉefurbo trans la rivero Vishnumati troviĝas sufiĉe alta monteto. Oni nomas ĝin ankaŭ Simio-monto pro multnombraj simiaroj, kiuj vivas tie. Sur ĉi monteto en la 3-a jarcento a.K. estis starigita Swyambhunath (Svajambunat) stupao, unu el la plej konataj budhaj konstruaĵoj en la hindua mondo. Por atingi ĝin necesas supreniri 300 ŝtonajn ŝtupojn.

La alia stupao, Boudhanath (Baudanat), kiun mi ankaŭ vizitis, situas en ebena nord-orienta parto de Katmando. Ĝi estas la plej granda en Nepalo kaj unu el la plej grandaj en la mondo. Ĉi stupao ĉiam estis ligita al tibeta budhismo, kaj nun

ĝin ĉirkaŭas tibetaj monaĥejoj. Ekde la dua duono de la 20-a jarcento Boudhanath transformiĝis al la religia kaj kultura centro de tibeta popolo de Nepalo. Okaze de gravaj eventoj sur la stupao okazas fantaste belaj ceremonioj, kiujn akompanas bruligo de miloj da kandeloj, dismetitaj laŭ perimetro de ĉiu nivelo.

Antaŭ la vojaĝo al Nepalo el retmesaĝo de Razen mi eksciis, ke unu el nepalaj geesperantistoj lernis medicinon en Rusio. Kaj veninte al Katmando mi kontaktis tiun ĉi personon. Evidentiĝis, ke Nirab Kayastha eklernis Esperanton en Ĉeboksari kaj ĝuste tie hardiĝis kiel esperantisto. Nirab tre ĝojis pri la ebleco iom paroli ruse, sed kutime ni uzis Esperanton. Sidante en iu restoracieto de Thamel kaj trinkante kafon Nirab rakontas pri sia vivo. Post la reveno el Rusio, kie restado por li estis agrabla ankaŭ pro E-medio (do, li salutas ĉiujn konatajn geesperantistojn en Ĉeboksari kaj en aliaj urboj de Rusio!), Nirab eklaboris en armea hospitalo de la ĉefurbo. Nun li estas traŭmatologo kaj pro la laborokupateco ne havas multe da tempo por E-aktivi. Pluse Nirab edziĝis, kaj baldaŭ li devas patriĝi. Tre agrablan



kremacio

impreson lasas tiu ĉi mia “ekssamlandano”!

Bhaktapur situas 14 kilometrojn oriente de Katmando. Por eniri en la historian parton de la urbo oni pagigas eksterlandanojn devize. Espereble, la akumulata mono daŭre helpas al plia konservado de historia heredaĵo. Kaj vere, Bhaktapur estas bone konservita urbeto de Nepalo, en kiu sur ĉiu paŝo videblas arta talento de lokanoj, precipe en lignoĉizado. Oni trovas domojn kun bele ĉizitaj fenestroj kaj pordoj. Ankaŭ la fama reĝa palaco kun 55 fenestroj estas tre eleganta. Ekzistanta ekde la 9-a jarcento, la palaco nun funkcias kiel arta muzeo. Sed la plej granda parto de la urbo estis konstruita en la jaroj 1697-1722. La loĝantaro de Bhaktapur estas tre religiema. Ĝi ĉefe kredas je hinduismo kaj budhismo.

Memkompreneble, vizitoj al historie allogaj lokoj forprenas multe da tempo kaj fizikaj fortoj. Post ili oni emas ripozeti en arba ombro ĉe laĝeto, samkiel ripozas maljunaj viroj. Ankaŭ mi kaj Razen sidiĝas pornelonge apud tia kompanio kaj observas multegajn fiŝojn, kiuj konkuras je kaptado de iuj manĝopecoj, kiujn ĵetas de sur la bordo gaja infanaro.

Alia artoplena urbeto en la Katmando-Valo, Patan, situas je 5 km sude de la ĉefurba centro. Estante budhista, Patan havas multajn budhanajn kortojn kun tre belaj temploj. Unu el ili estas la Ora Templo. En aŭgusto en Patan okazas speciala procesio dum la tago, kiu nomiĝas “Mata-jaa”. En tiu ĉi tago homoj, plejparte gejunuloj, promenas tra la urbo dum 8-9 horoj kun lampoj aŭ kandeloj. Ili vizitas ĉiujn templojn kaj sanktejojn en Patan. Neordinaraĵo konsistas el tio, ke ili vestas sin amuze: viroj – en virinajn vestaĵojn kaj virinoj – en la virajn. Krome, venas homoj, kiuj surmetas kostumojn de diabloj aŭ sanktuloj, reĝoj aŭ almozuloj ktp.

Dum mia restado en Katmando Razen kaj mi pasigas horojn interparolante pri diversaj aspektoj de la vivo en lia naskiĝlando, ankaŭ pri E-movado en Nepalo (vidu <www.razeno.blogspot.com>), kiu estas relative juna kaj nun travivas malfacilan periodon. La kerno de la asocio estas tiuj esperantistoj, kiuj lernis la lingvon en 1990 helpe de polo Joachim Werdin. Skismoj en E-movado ne estas novaĵo. Tiujn problemojn, kiujn nun havas Nepala Esperanto-Asocio (NEspA), frontis kaj frontas multaj landaj E-organizaĵoj. Jen ekzemploj. En Nepalo forestas nacilingva E-vortaro. Nun ĝi estas preskaŭ finverkita de certa grupo de nepalaj geesperantistoj, al kiuj aktive helpas dano Jacob kaj usonano Filip, loĝantaj en Katmando. Tamen, ial kelkaj nepalaj geesperantistoj kontraŭstaras ĝian eldonon kaj sen klarigi la kialon diras, ke por uzado sufiĉas anglalingva E-vortaro. Jam du jarojn la eksaj prezidanto kaj kasisto de NEspA ne transdonas siajn funkciojn al la novelektitoj. Ne mankas ankaŭ diversaspektaj problemoj, kiuj altiras profitemulojn al la movado. Kelkaj iam aktivaj esperantistoj (inoj preskaŭ forestas en la movado) pro diversaj personaj kialoj kaj ankaŭ malglataĵoj en NEspA ne plu vizitas E-kunvenojn. Tamen mi ege esperas, ke la nuna estraro sukcesos venki malfacilaĵojn, plivigligi sian agadon kaj la movado ekprosperos.

Mi instigas mian gastiganton telefoni al homoj, kiujn E-lernigis Tibor Sekelj en 1958 dum sia 6-monata restado en Nepalo. Realigis renkontiĝoj kun 2 el 3 malnovaj esperantistoj. Ambaŭ daŭre laboras, flue parolas la lingvon. Unu el ili, Baikuntha Maskey, televida ĵurnalista, estas UEA-fakdelegito kaj vojaĝas de tempo al

tempo al UK-oj. Kun B.Maskey ni parolas pri lia E-vivo, pri T.Sekelj. En la kapo de Razen naskiĝas la ideo intervui kaj surbendigi rememorojn de la pioniroj de E-movado en Nepalo. El la parolo ĉi-tema mi eksciis, ke siatempe ankaŭ Simo Milojeviĉ venis al Katmando por instrui la lingvon.

La E-Domo en Katmando troviĝas en Thamel, en la lasta etaĝo de 5-nivela betona domo. Ĝi estas luita de NEspA-anoj kaj havas 3 ĉambrojn. Provizita per elektro- kaj telefonkonektoj, 2-3 tabloj, seĝoj, komputilo kaj tualetejoj, la E-Domo ebligas akcepti gaste aliurbajn kaj eksterlandajn geesperantistojn. Sed netaŭge zorgata kaj purigata, kun regule malkroĉigantaj kurtenoj, malbone funkcia akvosistemo ĝi servas nur al kunvenoj de loka esperantistaro. Do, ĝuste en unu el la ĉambroj venante frumatene mi E-instruis kelkajn tagojn helpante al malmultaj dezirantoj perfektigi siajn lingvosciojn. La E-Domo estas luita kontraŭ ioma donacmono kaj tiu, kiun NEspA havas profite de HIR (Himalaja Internacia Renkontiĝo). HIR

estas aranĝata februare ĉiun duan jaron, al tiuj renkontiĝoj venas kutime 10-20 eksterlandaj geesperantistoj. Fine de 2008 la luado finiĝos pro manko de mono, kaj NEspA devos forlasi tiun ĉi ejon. En unu el la 3 ĉambroj troviĝas ŝranko kun E-libroj kaj E-revuoj. Ili fakte estas donacitaj ĉu de iuj E-organizaĵoj (inkluzive UEA), ĉu de iuj privataj geesperantistoj. Ĥaose metitaj kaj, supozeble, delonge legataj de neniuj, la libroj kovriĝis per densa tavolo de polvo, kungluiĝis kaj iuj difektiĝis. Tial aĉetitajn kaj venigitajn de mi ĉ. 15 E-librojn el Rusio mi decidis ne donaci al la NEspA-biblioteko, sed disdoni private al geesperantistoj, kun kiuj mi konatiĝis kaj amikiĝis dum mia restado en la lando. Al estraranoj de la asocio mi proponis mian helpon por iom ordigi la E-bibliotekon kaj



lingvovidilo
esperanto - nepali
एस्पेरान्तो - नेपाली

Verkis : Razeno Manandhar, P.O. 3447, Kathmandu, Nepalo

BONVENON AL NEPALO

Nepalo, la ekzotika lando apud la Himalajo estas fama en la mondo pro ĝia diverseco laŭ multaj aspektoj. Diversaj religioj harmonias tie, kaj fluas diversaj kulturoj de kulturaj fenomenoj, kiuj apartenas al multaj etnaj grupoj, kun sama rapido, kune kun, similas al bela ĉielarko. Riĉa arto kaj arkitekturo en la valo de Katmando allogas lertajn okulojn kaj folkmuziko tras atenton de spertaj oreloj. Krome, la riĉa panoramo de la Himalajo hipnotigas naturamantojn kaj ili ekoniĝas kun malfermaj okuloj kiam la suno brilas.

En Nepalo ekzistas pli ol 30 lingvoj kaj dialektoj kaj la nepalo servas la landon kiel interlingvo, kiu estas parolata de pli ol 50% de la popolo. Ĝi estas hindarjana lingvo, proksime rilatas al la sanskrito. Origine, ĝi estis konata kiel 'la riĉa' aŭ la lingvo de Ĥiĉoj. Poste ĝi estis konata kiel 'la parolita', aŭ la lingvo de montanoj. Post unuiĝo de la lando, Ŝah dinestis regis la landon kaj Nepalo fariĝis konata ankaŭ en Eŭropo. Tieaj verkistoj donis trian nomon al ĝi—'la gurfal', la lingvo de Gurĉoj, la bravaj soldatoj de la mondmilitoj. Poste, 'la nepalo' fariĝis la plej konata nomo de la lingvo, post kiam ĝiaj parolantoj akiris la plej grandan spacon en la politiko de Nepalo.

Origino de la nepalo estas Sinĝa (okcidenta provinco en Nepalo). Skribita formo de ĝi ekzistas de 14a jarcento, sed la uzado ne estis regula ĝis fino de 17a jarcento. Nun ĝi estas la plej ofte uzata lingvo de Nepalo en registaraj kaj administrativaj aferoj. Ĉiuj devas lerni ĝin por studi en lernejo aŭ universitato.

Kiel filo de la sanskrito, la nepalo havas fortan rilaton kun la hindia lingvo je leksika, semantika kaj sintaksa niveloj. Kaj ambaŭ uzas la saman alfabeton devnagaron. Ankaŭ la nepalo uzas la sanskritajn vortojn aŭ identajn aŭ ŝanĝitajn.

enkomputiligi la titolojn. Tial preskaŭ ĉiutage dum unu semajno po 3-4 horoj mi pasigis ĉe komputilo en la asocio, profitante la okazon eviti fortan surstratan sunon, legeti tiujn E-periodaĵojn kaj librojn, kiujn mi neniam havis okazon teni en la manoj.

De turisma kaj historia vidpunktoj ne nur Katmando interesis min. Iom adaptiĝinte al la loka vivo, mi deziras ekvidi aliajn lokojn en Nepalo. Do, mi startas perbuse al Pokhara (Pokara) – urbo-perlo en geografia centro de la lando, 200 km for de Katmando. Alveno al Pokhara estis sufiĉe malfrua. Vespere malheliĝas frue en montaro, pluse Nepalo ne transiras al somera tempo, samkiel multaj aziaj landoj. Matene mi telefonas al la prezidanto de urba E-grupo Himlal Parajuli. Ni renkontiĝas en simpatia hotelo kun belege prizorgita ĝardeneto, kie mi noktumis. Himlal vizitigas al mi la urbon. Oni tuj rimarkas, ke ĝi estas provinca: domoj estas pli malaltaj, ol en Katmando, la kvietaj stratoj iom vilaĝecaj, ĉe la lago Feva – mul-

taj hoteletoj por eksterlandaj turistoj, komfortaj kafejoj kaj restoracietoj kun mod-
eraj prezoj, tute ne alkroĉemaj vendistoj, polucio preskaŭ ne senteblas. En ĉio
videblas, ke Pokhara estas paradiza ripozloko, ĉirkaŭata de Himalaĵoj. Himlal, in-
struisto de la angla lingvo en kolegio, ne tre lerta E-parolanto, konatigas min ankaŭ
kun alia esperantisto, Yadu, kies konoj de la lingvo apenaŭ takseblas kiel tolere-
blaj. Tamen, tiu apenaŭ E-parolanta juna viro afable akompanas min (kun E-
lernolibro enmane kaj survoje lernanta kun mi ciferojn kaj aliajn vortojn) al fama
montopinto de la urbo. Sur la montopinto troviĝas loka vidindaĵo – Templo de tut-
monda paco. De tie videblas pli vasta panoramo de Himalaĵoj, de la Feva-lago kaj
la ĉeborda Pokhara. Min ravas himalajaj montopintoj, kiuj altiĝas ĉene super
nuboj. Vespere mi gastas en la familio de Himlal, kies, dume unuetaĝa, komforta
domo kun multaj ĉambroj troviĝas sufiĉe for. La sekvantan tagon mi vizitas la lo-
kan muzeon de montaro. La lastan vesperon venas ankoraŭ unu junulo, kies nomon
mi ne memorfiksas kaj kiu iom balbutas Esperante. Ĝenerale, Himlal tre ardas por
pli bone lerni la lingvon kaj aktivigi E-agadon en Pokhara. Ankaŭ al tiu ĉi grupeto
mi donacas E-librojn kaj kelkajn rusiajn memoraĵojn.

Ĉiuj interurbaj busoj en Nepalo startas frumatene pro montareca surfaco de la
lando kaj ĝiaj serpentumaj kaj, memkompreneble, nelumigitaj vojoj, veturado laŭ
kiuj daŭre elvokas certan timon. Ĉi-foje mi veturas al Lumbini (sankrite – ŝatata),
sankta loko por pilgrimantoj en suda parto de Nepalo. Ĝuste ĉi tie antaŭ 2500 jaroj
naskiĝis Gaytamo la Budho, serĉinta kaŭzon de homara malfeliĉo. Li atingis la ple-
supran gradon de sciado kaj klarvidado kaj eniris en la nirvanon.

Post kiam mi aingis bonorde la finhaltejon, en loka turisma agentejo, kiu devas
prizorgi mian 2-tagan restadon, oni proponis al mi veturi ĝis la hoteleto... per mo-
torciklo. Feliĉe, ke mi ne kunprenis la valizon (!) por ĉi vojaĝo, sed nur la dorsosa-
kon. De tempo al tempo dumvojaĝe telefonas al mia loka numero de poŝtelefono
Razen. Atentema kaj zorgema, li informiĝas pri la paso de mia vojaĝo, ĉu mi bone
eltorniĝas sen scio de nepali- aŭ de alia loka lingvo.

De mateno pluvegas, kaj mi riskas ne ekvidi ĉion planitan. Tamen al tagmezo la
pluvego finiĝis same rapide, kiel komenciĝis. Do, la mendita rikiŝo, tirata de ju-
nulo, veturigas min tra la vastega parka teritorio kun temploj de diversaj konfesioj:
ĉina, korea, japana, vjetnama kaj... germana. Budhistoj el ĉiu mondoparto pilgri-
mas al Lumbini por preĝi kaj mediti en speciale konstruitaj centroj de meditado.

Mi daŭrigas mian vojon piede laŭ unusola strato de la vilaĝo, kiu apudas la
sanktan lokon. Duetaĝaj brikaĵoj finiĝas preskaŭ tuj. Sur tegmento de unu el
ili maljuna virino dismetas surŝnure lavitajn vestaĵojn. Teretaĝaj domoj kun kvad-
rataj truetoj anstataŭ fenestroj estas faritaj el argilo kaj kovritaj per pajlo kaj arbo-
branĉoj. Antaŭ ili ludas infanoj, virinoj lavas manĝilaron, kribras farunon, purigas
rizon. Apudas kuŝantaj hundoj kaj promenantaj bovinoj. En ejoj, konstruitaj el
lignolatoj sur duonmetraj fostetoj, aree je 2×2 metroj, jen barbiro razas klienton kaj
tondas liajn harojn, jen virino vendas primitivajn hejmajn ilarojn. Sekvatage post
nekredeble longega vojaĝo, kiu daŭris 11 horojn (!), mi revenas al Katmando.

Iun tagon de aŭgusto, ekde mateno ni iras spekti la karnavalon “Gaiĝatra” en
centro de la urbo. Dum ĉi evento, nomata anakŭ “Saparu”, okazas procesio de bo-

vinoj. Homoj, kies familianoj forpasis en la kuranta jaro, partoprenas en la procesio. Ili aŭ venigas bovinojn, aŭ vestas kaj dekoras geknabojn kvazaŭ bovinojn, strange ŝminkante iliajn vizaĝojn. Do, la tuta procesio promenas tra la urbo karnavale. Ĝin akompanas tradiciaj muzikgrupoj kaj kantantoj. Homoj en stratoj donacas al infanoj manĝaĵojn, precipe dolĉaĵojn, trinkaĵojn aŭ monerojn. La festivalo en tiu ĉi formo komenciĝis en la 18-a jarcento, kiam juna filo de la reĝo Pratap Malla mortis. La reĝino longege ploris, kaj la reĝo ne sukcesis trankviligi ŝin. Do, li petis tiujn civitanojn, kies familianoj mortis en kuranta jaro, kolektiĝi ĉe la palaco. La reĝino vidis milojn da homoj, kies parencoj forpasis, kaj ŝi komprenis, ke morto estas neevitebla. Krome, la civitanoj vestis sin tiel amuze, ke la reĝino ekridis. De tiam tiu ĉi tago estas ankaŭ la tago por la homoj, ke ili forgesu la doloron pro forpaso de parencoj kaj daŭre vivu ĝoje. En nuntempa vivo, ĉi tago ankaŭ estas la tago, kiam civitanoj rajtas kritiki la registaron, ŝerci kaj aktori surstrate.

Do, en Katmando oni kvazaŭ trafas al fabelo. La miljara historio dense interplektiĝas kun nuntempo, kaj oni ĉesas percepti realecon. Antikvaj stupaoj, pagodoj



kaj temploj ne transformiĝis al muzeaj relikvoj, kiel tion oni praktikas en eŭropaj landoj. Ĉi tie tiun ĉi antikvecon oni uzas ĉiutage. En antikvaj domoj el ĉizita ligno oni vivas same, kiel antaŭ cent jaroj. Neniu gardas antikvajn monumentojn. Tial oni rajtas proksimiĝi al ili, tuŝeti aŭ grimpi sur iu ajn. Kaj multnombraj infanoj, kies simpatiaj lernejoj distingigas de loko al loko, ludas inter tiu majesteco kaj beleco post fino

de lecionoj.

Multnombraj ĉarmaj vilaĝetoj troviĝas ĉie en la valo ekster la ĉefurbo. En la antikva vilaĝo Khokna, proksime de Katmando, okazis finaŭguste speciala kaprina festo, iom brutala. Ĉiujare certaj personoj protestas kontraŭ ĝia okazigo. Sed la tradicio ankoraŭ daŭras. Do, la evento komenciĝas per tio, ke junuloj, venintaj el diversaj kvartaloj de la vilaĝo, dividiĝas je du teamoj. Iu vilaĝa gravulo ĵetas kaprinon en la lagon. Nature, ĝi mortas tuj, kaj la konkurantaj junuloj plonĝante devas trovi ĝin subakve kaj eltiri. La konkurado estas streĉa je subtenaj krioj de spektantoj, kiuj amase ĉeestas. Viroj kaj virinoj de ĉiuj aĝoj, gejunuloj kaj infanoj dense staras ĉe laga barilo, ĉe ĉiuj fenestroj de apudaj domoj kaj sur ties ŝtuparoj. La teamo, kiu sukcesas elpreni la kadavron, devas aranĝi feston en la vilaĝo por la konkuranta teamo kaj prezenti teatraĵon por la vilaĝanoj post du monatoj.

En Nepalo entombigoj estas tre-tre raraj. Laŭ la statistiko en la lando 80% da homoj estas hinduistoj kaj 15% – budhistoj. Do ilin oni kremacias. Nur restas malgrandaj grupoj de islamanoj kaj kristanoj, kiuj enterigas la mortintojn. En la nord-orienta parto de Katmando ĉe la bordo de Bagmati troviĝas la templo Pashumpatinath (Paŝumpatinat). Apud ĝi okazas bruligo de kadavroj. Kremacio estas ĉefa rito, kiun oni okazigas por forpasintaj homoj. En ĉi loko la bordoj de la rivero estas ligita per blankŝtona ponto. Blanka koloro estas la koloro de funebro en Nepalo. Ĉe ambaŭ flankoj de la ponto troviĝas rektangulaj ŝtonaj plataĵoj por kremacio. Ĉe unu flanko – plataĵoj por kremacio de ordinaraj homoj, de alia – unue, por ministroj kaj aliaj gravaj oficialuloj, poste – por reĝaj familianoj. Observi longdaŭran ceremonion de kremacio venas scivolemaj turistoj. Sur lignan ŝtiparon oni metas kadavron, volvitan en blankan mortotukon. Poste oni dekoras ĝin per floroj, ŝutas odorigajn pulvorojn kaj bruligas per pajlofaskoj. La ceremonio okazas senhaste kaj povas okupi kelkajn horojn. Poste la cindron kaj la reston de ostoj oni ĵetas en la riveron, kiu... daŭre fluas tra la urbo kaj en kiu kutime baniĝas infanoj...



kun Razen kaj lia edzino

En unu el posttagmezoj mi konatiĝas kun Indu Thapalia, kiu antaŭnelonge revenis el Eŭropo post UK en Roterdamo. Mi gastas en ŝia vasta domo, konatiĝas kun la familianoj. Indu de tempo al tempo gastigas eksterlandajn geesperantistojn, por kio en ŝia domo estas speciala E-ĉambro kun verdkoloraj dekoroj. Ni parolas jen pri tio, jen pri alio, kaj evidentiĝas, ke ni havas komunajn konatojn. Jen, vica pruvo ke tiom malvasta estas nia E-komunumo!

La lastan sabaton de mia restado en Katmando mi prelegas en E-domo pri la pasintjara vojaĝo de multnacia E-grupo tra Siberio survoje al UK en Japanio. La komputilo de Razen helpas je prezentado. Fine mi regalias la dekon da ĉeestantoj per bukanita porkaĵa kolbaso, vanilaj kringoj, per kafo kaj rusa teo. Nirab, gustuminte diversajn viandaĵojn en Rusio, tranĉas profesie kolbason kaj dismetas popece sur blankajn tostformajn panpecojn. Kiam finiĝis la oficiala parto de la kunveno, ĉe taso da trinkaĵo fluas interesaj paroloj inter nepalanoj, Filip kaj mi. La sabaton kronas komuna nepalstila vespermanĝo en restoracieto. Mi aŭdiaŭas gesamideanojn, memorfiksante okule kaj fotile la vizaĝojn de novaj geamikoj.

Kun certa tristeco mi forlasas Nepalon. Mi havis pliajn travivaĵojn en tiu ĉi alloga lando, por kies priskribo eblus verki multajn paĝojn! Mi travivis ĉi tie etan, sed tre intensan parton de mia vivo, al kiu multe kontribuis Razen kaj lia familio. Ĉi malgranda lando, krom ĝangaloj, torentaj riveroj kaj montopintoj, posedas nekapteblan altiran energetikon. Nepalo ŝatas siajn gastojn, kaj ĉi tien indas reveni!

Tatjana Loskutova (Ivanovo)

Bulteno de REU

TILE-4 EN SOĈI

REU kaj E-klubo de Soĉi invitas vin al la informa kaj movada aranĝo “Tagoj de internacia lingvo Esperanto” (TILE-4), kiu okazos de la 31-a de oktobro ĝis la 4-a de novembro 2008.

Ĉu vi volas daŭrigi E-someron? Bonvenon al Soĉi! Suda aŭtuno estas milda, maro – ankoraŭ varma, la urbo estas daŭre plena de allogaĵoj, kaj la prezoj estas jam tre moderaj.

La aranĝo konsistos el du ĉefaj flankoj:

- ekstera informado: ni provos atentigi pri E-o la publikon kaj amaskomunikilojn;

- movada agado: okazos kunvenoj pri regiona E-agado, aktivulaj kunvenoj, rezultoj pri organizo de IET-1 en Krimeo, rondaj tabloj kaj seminario pri ekspresa E-instruado.

Enkadre de la aranĝo okazos prezento de novaj E-libroj, vizito al Arbo de Amikeco, orgena koncerto, prelego pri pieda turismo kaj pri dolmenoj en la ĉemara regiono de Kaŭkazio. Por la partoprenontoj koncertos muzika grupo de la soĉia E-klubo. Samtempe kun la aranĝo okazos rapidkurso por soĉianoj kaj gastoj de la urbo. Estas planate organizi ekspozicion en la Kulturdomo pri “Praktika utiligado de E-to”. Viaj ekspoziciaĵoj bonvenas: fotoj, suveniroj, gazetartikoloj k.t.p. pri kontaktoj kun alilandanoj, ĝemelurbaj rilatoj, partopreno en Internaciaj aranĝoj k.t.p.

Ĉiuj gastoj estas petataj informi la organizantojn pri la dato, tempo kaj transporto de la veno. Ni renkontos vin!

Venantoj unue registriĝu kaj ricevu enloĝigan karton en la Kulturdomo – str. Gorjkogo, 85, “Rajonnij Dom Kulturi”, apud la fervoja stacidomo, tuj post la busstacio. La 31-an de oktobro ekde 8.00 tie deĵoros esperantisto (samovaro, bakaĵoj, buterpanoj, teo, kafo k.t.p.).

La aliĝkotizo estas 50 rubloj. Por la loĝado estas kelkaj variantoj kun la kostoj de 200 ĝis 2000 rubloj por unu nokto. La maro tre proksimas (ĉirkaŭ 200 metroj). Nutrado – memstara. Sed en la klubejo ĉiam pretas samovaro, bakaĵoj, buterpanoj, teo, kafo k.t.p. kaj en la Kulturdomo funkcias bufedo. La urba manĝejo proksimas je 100 metroj.

Dezirantoj povos plilongigi sian restadon ĝis vintro.

La interesiĝantoj bonvolu kontakti la organizantojn rete <bespalov_sochi@mail.ru> aŭ telefone: Vladimir Bespalov (+7-8622-621347, +7-918-0053368), Tatjana Davidova (+7-8622-623889, +7-918-2034609), Marina Ŝestakova (+7-963-1604716).

La organiza teamo

FINIĜIS LA ERAO DE RESPONDKUPONOJ


Dum multaj jardekoj UEA akceptis pagojn per internaciaj respondkuponoj. Ili estis simpla pagmaniero, kiam internaciaj mongiroj per banko aŭ poŝtmandato estis mal-facile fareblaj kaj subigitaj al diversaj limigoj aŭ eĉ en iuj landoj ne permesitaj al privatuloj. Lastatempe

ilia uzado maloftiĝis, ĉar internaciaj pagoj fariĝis pli facilaj dank' al la forigo aŭ mildigo de limigoj kaj pro disvastiĝo de kreditkartoj kaj de retaj pagmanieroj. En 1997 UEA ankoraŭ ricevis 1652 respondkuponojn, sed en 2007 – nur 43.

Antaŭe la Centra Oficejo povis facile ŝanĝi la kuponojn kontraŭ poŝtmarkoj en sia kutima poŝtejo, preskaŭ vid-al-vide al la CO trans la strato. Nuntempe la poŝtejo ne plu akceptas ilin, kaj ĉi-jare nur per escepta aranĝo la poŝta entrepreno TNT konsentis akcepti de UEA, por la lasta fojo, kvanton da kuponoj. Ankaŭ en multaj aliaj landoj internaciaj respondkuponoj ne plu estas vendataj nek akceptataj de la poŝto. Antaŭe ili ankaŭ havis senliman validecon, sed jam de kelkaj jaroj ili validas nur ĝis la dato presita sur ili. Parto de la kuponoj, kiujn UEA lastatempe ricevis de siaj membroj kaj klientoj, estis jam senvaloraj.

Pro la priskribita evoluo UEA ne plu akceptas internaciajn respondkuponojn kiel pagilojn por kotizoj aŭ servoj nek por aldoni bonhaston al UEA-kontoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA



tiel aspektis respondkuponoj

KOTIZOJ DE REU/REJM POR 2009

Individua kotizo – 120 rub. (por Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por ceteraj landoj – 12 eŭroj), inkluzivas la membrokarton, Jarlibron/Manlibron de REU, REU-bultenon kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM.

Dumviva kotizo – 3000 rub. (por Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por ceteraj landoj – 300 eŭroj) – ĉio la sama dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 40 rub. (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM); la familiajn kotizojn rajtas pagi samadresaj parencoj de individuaj aŭ dumvivaj membroj.

Rabatita individua kotizo – nelaborantaj gejunuloj kun la aĝo malpli ol 26 jaroj pagas 50% de la kotizo.

Subtenkotizoj (ĉio la sama kiel por la individua kotizo): *REU-subtenanto* – duobla individua kotizo; *REJM-patrono* – duobla individua kotizo.

Kolektiva membrokotizo – 40 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj), inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro/Manlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en

aranĝoj de REU/REJM por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 200 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la organizaĵo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi.

Rabatita abono de REGo – 230 rub. (ekster Rusio – 15 eŭroj), por ĉiuj membroj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj.

Ĉiuj membroj de REU kun la aĝo malpli ol 31 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.

Membroj de REU iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, la malpli ol 31-jaraj – ankaŭ de TEJO.

Aliĝilon, rublajn kotizojn kaj rabatitajn abonpagojn por REGo kaj “Komencanto” sendu (poŝtmandate) al: **Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская область.** La eŭraj kotizoj pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA. (Pri pliaj pagmanieroj informiĝu ĉe Mikaelo Ĉertilov rete <membreco@reu.ru>, telefone +7-916-2019437 aŭ poŝte laŭ la supre indikita adreso.)

Dekkvinjara knabo alvenis hejmen kun nova Mercedes-aŭto. La gepatroj kriis: “Kie vi akiris tiun aŭton!?”

Trankvile li respondis: “Mi aĉetis ĝin hodiaŭ.”

“Kontraŭ kiu mono?” postulis liaj gepatroj. “Kiom vi pagis?”

“Ĝi kostis nur 15 dolarojn,” la knabo diris.

Do, la gepatroj komencis kriegi eĉ pli laŭte: “Kiu vendus tian aŭton kontraŭ 15 dolaroj?”

“Estis la sinjorino proksime en nia strato,” respondis la knabo. “Mi ne scias ŝian nomon, ĉar ili nur lastatempe ekloĝis tie. Ŝi vidis min preterbicikli kaj demandis, ĉu mi volus aĉeti Mercedes-on kontraŭ 15 dolaroj.”

“Ho ve!” ĝemis la patrino. “Ŝi devas esti molestanto de infanoj. Kiu sciis kion ŝi farus venontfoje? Johano, venu rekte tien kaj klarigu, kio okazas!”

Do, la patro iris al la virino. Li postulis, ke ŝi klarigu, kial ŝi vendis novan Mercedes-on kontraŭ 15 dolaroj al lia filo.

“Nu,” respondis ŝi, “ĉi-matene mi ricevis telefonvokon de mia edzo. Mi kredis ke li estas for por komerca veturo, sed li informis min, ke li estas en Havajo kun sia koramikino kaj intencas ne plu reveni al mi. Li diris, ke estas embarasata kaj bezonas monon, do li petis min vendi lian novan Mercedes-on kaj sendi la ricevotan monon al li. Do tion mi faris.”

(esperanto-anekdotoj)

Eksciu, ke...

4000-a ELSENDO DE RADIO VATIKANA

La 5-an de oktobro *Radio Vatikana* disaŭdigis sian 4000-an (!) elsendon en Esperanto. La unua elsendo okazis en nokto inter la 17-a kaj la 18-a de aprilo 1976 (tio signifas inter la Sankta Sabato kaj la Paska Dimanĉo), en la kadro de la programo “Kun ni en la nokto”. Kiel raportite en *Espero Katolika* n-ro 7/1976 <http://www.esperokatolika.org/ek19761980/ek1976_07.htm#5>, ĝi konsistis nur el kelkaj vortoj de meditado, legitaj de s-ino Elizabeta Rzemnyi-Puracchio, hungarino loĝanta en Romo. Ekde la 25-a de aprilo 1976 estis disaŭdigata kvinminuta programo, registrita de la menciita sinjorino kaj de patro Giacinto Jacobitti. Sekvis pli ampleksaj kaj regulaj elsendoj ekde la 2-a de januaro 1977 ĝis la nuntempo.

Pri la aparta statuso de E-elsendoj de *Radio Vatikana* oni povas legi klarigojn ĉe <http://www.esperokatolika.org/ek19861990/ek1988_06.htm#13>, en *Espero Katolika* n-ro 6/1988. Por aŭskulti la elsendojn de *Radio Vatikana* vizitu <http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp>


Antonio De Salvo (Italio)

“FLUGILOJ DE MALFACILA VENTO” DUM IJK

De la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2008 kadre de la Internacia Junulara Kongreso en la urbo Szombathely, Hungario, tradicie okazis la instru-metodika seminario “Flugiloj de malfacila vento”, kiu estas projekto de ILEI kun subteno de E@I por komencantaj instruistoj de Esperanto kaj instruemaj esperantistoj.

La gramatika parto estis gvidata de Paŭlo Moĵajev (Ukrainio), kiu jam kungvidis la seminarion dum IJK-oj en Kovrov kaj Zakopane kaj dum RET-07 en Rusio. La metodikan parton gvidis Aleksander Osincev, kiu kungvidis la seminarion dum RET-07 kaj ĉefkunordigis du lastajn seminarion. Irina Gonĉarova, majstrino de la projekto, rolis kiel observanto.

La seminarion partoprenis pli ol 15 personoj el diversaj landoj kun diversaj instruspertoj kaj aĝoj. La gramatika parto enhavis malfacilaĵojn de Esperantogramatiko kaj gramatikan ekzercadon. Dum la metodika parto oni pridiskutis diversajn metodojn de lingva instruado, planadon de leciono kaj kurso kaj specifaĵojn de Esperanto-instruado. La seminario konsistis el 4 metodikaj kaj 4 gramatikaj poduhoraj programeroj dum 4 tagoj. Dum la tria tago okazis prezentoj de diversaj Esperantometodoj far spertaj instruistoj de Esperanto: Zlatko Tišljarić, Paŭlo Moĵajev (Ukrainio), Irina Gonĉarova (Rusio) kaj Xosé Conde (Hispanio). Dum la 4-a tago la parto-





prenatoj povis mem prezenti siajn 15-minutajn lecionojn.

Ĉiujn kondiĉojn de partopreno plenumis 7 personoj (po unu el Nederlando, Ĉeĥio, Germanio, Hungario, Francio kaj du el Rusio), kiuj solene dum internacia koncerto ricevis atestojn kun rekomendo kiel instruistoj de Esperanto. Ĉiuj partoprenantoj iĝis membroj de ILEI.

*ĉefkunordiganto kaj gvidanto
Aleksander Osincev*

11-a INTERNACIA FOTOKONKURSO

Post dek sukcesaj konkursoj (1998–2007) la redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al partopreno en la dekunua Internacia Fotokonkurso.

En la fotokonkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj. La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (236039 Kaliningrad, p/k 1205). La fotoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1-a de decembro 2008.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de “La Ondo de Esperanto” en 2009.
2. 25 eŭroj kaj abono de “La Ondo de Esperanto” en 2009.
3. Abono de “La Ondo de Esperanto” en 2009.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de “La Ondo de Esperanto”) – por la plej bona foto pri la temo “Vizaĝoj”.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en “La Ondo de Esperanto”. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31-a de decembro 2010 ekskluzivan rajton uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formoj kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-raĵon havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

Legu pri la antaŭaj fotokonkursoj kaj vidu plurajn premiitajn fotojn en la retejo de “La Ondo” <<http://www.esperanto.org/ondo/>>, en la rubriko “Internacia Fotokonkurso”.

Halina Gorecka, sekretario

364000 DVD PRI ESPERANTO – SENPAGE!

DVD kun la simpla titolo “Esperanto” aperis la 10-an de septembro 2008 kiel aldonajo en la grava pola tagĵurnalo *Gazeta Wyborcza* kun la rekorda eldonkvanto de 364000 ekzempleroj. Ĝi aperis en ĉiuj eldonoj de la gazeto kiel senpaga kromaĵo, kaj la aperigon de la disko en la gazeto financis la urbo Bjalistoko. La diskon kreis la organizaĵo *E@I* laŭ la mendo de la urbo Bjalistoko. Multaj polaj esperantistoj aĉetadis dum la tago po 10-20 gazetoj kun la disko, celante disdoni ĝin al siaj konatoj kaj por uzi ĝin kiel taŭgan kaj malmultkoston informilon.

En la disko “Esperanto” oni promenas kvazaŭ tra fabela, virtuala Bjalistoko kaj vizitas unuopajn konstruaĵojn de la urbo. Aperas konstruaĵoj kiel Lernejo (kelknivelaj kursoj de Esperanto), Kinejo (ses filmetoj pri Esperanto), Muzikejo (kantoj en Esperanto kun tekstoj), Gazetĝiceto (prezento de kelkaj gravaj E-gazetoj), Esperanto-muzeo (informoj pri Zamenhof, pri E-aranĝoj, pri organizaĵoj...), Biblioteko (kelkaj famaj verkoj en Esperanto)... La vizitantojn de la urbo (uzantojn de la disko) bonvenigas en la urbodoma konstruaĵo de Bjalistoko la urbestro Tadeusz Truskolaski mem per mallonga filmeto (li salutas homojn kaj en la pola kaj en Esperanto).

Vi povas legi artikolon de Peter Balaŝ pri la disko en *Libera Folio* (la foto estas prenita ĝuste de tie) ĉe <http://www.liberafolio.org/2008/gazetawyborcza/>.

(esperanto-l)



ZAMENHOF-FESTO EN UNESKO

Iniciate de la pola delegitaro ĉe Unesko, subtenata de la litova delegitaro, kaj en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio, la 15-an de decembro 2008 okazos en la sidejo de Unesko en Parizo solenaĵo por celebri la naskiĝdaton de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Samtempe ĝi estos bela enkonduko al 2009 – la jaro de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Dum la festo estos pluraj oficialaj salutoj de la ambasadoroj kaj de reprezentantoj de Unesko kaj sekvos poste paroladoj, spektaklo de filmeto pri Esperanto kaj bufedo. La ĉefaj paroladoj estos tiuj de la franca lingvistino Henriette Walter kaj de la nepo de Zamenhof, Louis Zaleski-Zamenhof. La tuto en solena etoso okazos de la 17.30 ĝis la 20.30 en la sidejo de Unesko en Parizo. Ĉiuj esperantistoj estas varme invitataj partopreni.

La organiza komitato

EL HISTORIO DE ESPERANTO EN TOBOLJSK

Ĉi-jare mi tute subite legis mirindan antikvaĵon – la gazeton “Сибирская новь” (“Siberia novaĵo”), datitan de la 23-a de februaro 1910 (!). Ĝi estis eldonita en Tjumenj. Kun grandega intereso mi legis tiamajn novaĵojn, anoncojn kaj rek-

lamojn. Mi provis imagi la siberian vivon antaŭ cent jaroj. Mi volis ekscii, kiajn ŝatokupojn havis homoj, kiel oni pasigis sian libieran tempon. Min surprizis nomoj de la artikoloj sur la unua paĝo. Juĝu mem: “Grandioza maskobalo”, “La unua elektroteatro en Tjumenj”, “Koncerta Halo ‘Ermitaj’”, “Rapida ŝipveturigo de varoj”, “Ŝipoj el Ameriko” ktp.

Anonco: “Hierau forpasis s-ro Kinodirektoroff, la estro de la plej granda urba kinejo. La entombigo okazos postmorgaŭ je la 10.00, 12.30, 15.00, 17.30 kaj 20.00.”
(esperanto-anekdotoj)

Tio, kion mi legis sur la lasta paĝo, superis miajn prediktojn. Fakte, antaŭ kelkaj jaroj mi laboris en la loka arkivo kaj vane provis trovi almenaŭ unu linion pri Esperanto. Kaj ĉi tie sur la lasta paĝo mi trovis jenon:

“Eksperantistaj (*ĝuste tiel, kun “k” – D.G.*) societoj estas vaste disvastigitaj en Okcidenta Eŭropo: preskaŭ en ĉiu granda urbo funkcias rondeto de eksperantistoj, ĉie oni provas malmultkostigi veturadon, loĝadon, plifaciligi konatiĝon kun lokaj vidindaĵoj. Tio ĉi donas grandan oportunon por E-posedantoj kaj eblon por neriĉaj homoj malmultkoste kaj kun granda utilo entrepreni eksterlandajn vojaĝojn.

En Toboljsk ĉe la loka muzeo oni povas lerni “eksperanton” kaj tiel uzi avantaĝojn, kiujn donas scipovo de la internacia lingvo. En Krasnojarsk okazis la unua kunveno de eksperantoj kaj simpatiantoj nombre de 120 homoj. La kunveno estis malfermita de B.A.Perrott, kiu faris revuon de la sukcesoj en la Krasnojarska E-movado. Lernantoj de “eksperanto” nombras 200 homojn. Ankaŭ en Tjumenj estas personoj, kiuj lernas ĉi tiun artefaritan internacian lingvon.”

Kiel ni scias, la unua E-kongreso estis en 1905. Nur kvin jaroj pasis post ĝi, tamen la loĝantoj de Toboljsk, Tjumenj kaj eĉ Krasnojarsk jam havis eblon lerni la lingvon kaj praktiki ĝin dum vojaĝoj. Eble en estonto ni malkovros novajn nekonatajn paĝojn de Esperanto-historio en Ruslando.

Dilara Gadirova(Toboljsk)

(aŭguste la artikolo aperis ruslingve en la ĵurnalo “Toboljsk”)

TRISTA UK EN ROTTERDAMO

Jam de multaj jaroj ni ne vizitis Universalajn Kongresojn. Antaŭaj UK-oj restis en la memoro kiel festoj, stresaj, sed interesaj. La samon ni atendis ankaŭ ĉi-foje, sed ĉi-jara UK estis la plej mankohava, kian oni nur povus imagi.

Jen kelkaj ekzemploj: nia hotelĉambro evidentiĝis malpura ejo kun rompita ŝranko, nepurigita duŝejo kaj makuloj sur griza tapiŝplanko, kvazaŭ oni antaŭe buĉis iun tie. Intertraktado kun administrantoj de la hoteleto gvidis al nenio, do ni veturis al la kongresejo, kie ni dum horoj serĉis la respondeculon de LKK pri loĝado, vicestaris ĉe la loĝiga servo k.t.p. Dum aliaj kongresanoj ĝuis la interkonan vesperon, ni okupiĝis pri tranoktebleco, kiun ni antaŭ monatoj pagis al UEA. Finfine meznokte ni “surteriĝis”, hunde lacaj kaj elĉerpitaj, en alia hotelo: en diversaj ĉambroj, sur diversaj etaĝoj. De tiu momento ni preskaŭ ĉiutage devis ŝanĝi la hotelon. Ĉiumatene ni metis la valizojn en deponejon, vespere elprenis ilin kaj iris al ĉambro en alia hotelo. Do, ĝis la lasta tago ni apenaŭ povis elpaki niajn aĵojn.

Kompreneble, ke ni ne multon kaptis en la kongresejo dum la unuaj tagoj.

Aparte perpleksis nin la malhelpemo de la loĝiga servo: la nederlandaj esperantistoj, kiuj ja scipovis la nederlandan lingvon, tute ne volis helpi nin (kaj aliajn) per telefonado, konsiloj, tradukoj al la nederlanda. Des pli stranga estis tiu ĉi konduto, ke ĝi kontrastis al normalaj, “surstrataj” nederlandanoj, kiuj ne parolis Esperanton, sed estis helpemaj kaj afablaj, rigardis en nian mapon, serĉis kun ni konvenajn stratojn, per gestoj kaj mimiko kompletigis la mankantan komunan lingvon.



Jam de la unuaj horoj oni havis la impreson, kvazaŭ la organizantoj ĵuris fari la kongreson por la partoprenantoj kiel eble plej malagrabla. Postaj spertoj nur plifortigis la impreson. Ekzemple, por la “nederlanda eksprese” kolektiĝis en la saloneto amaso da homoj, tiel ke eĉ surplanke ne plu estis loko. Multaj dezirantoj eklerni la nederlandan devis resti ekstere. Tamen la organizantoj ne ŝanĝis la salonon, oni simple ŝlosis la ĉambron de interne, por ke neniu, krom eta kvanto, plu eniru.

Nia konato, ĉiujara partoprenanto de UK-oj, plendis pri “magraj kongressaketoj”, preskaŭ malplenaj. Alia kongresano rakontis al ni, ke li mendis ekskurson al la pacmuzeo en Hago, sed kiam la grupo tien alvenis, oni ne enlasis ĝin, ĉar la vizito ne estis anoncita (tamen antaŭ monatoj pagita). Do, ili “kisis la pordon” kaj reveturis Roterdamon.

La “aŭtoraj duonhoroj” ne estis diskonigitaj ne nur al la publiko, sed foje eĉ al la koncerta aŭtoro. Ekzemple, al la aŭtora duonhoro de Ragnarsson venis iom da publiko, sed la poeto mem ne aperis, ĉar oni lin simple ne sciigis pri tio. La “aŭtora duonhoro” sen la aŭtoro – specialaĵo de la ĉi-jara UK.

Alia apartaĵo, kiun ni ankoraŭ neniam spertis, estis vole-nevola “sidanta dancado”. En la plej granda salono, tamen tro malgranda por ĉiuj (duono de la partoprenantoj devis sidi antaŭ televidekranoj en alia ejo), oni ne permesis moviĝi laŭ la muziko de JoMo (ekstari, danci, k.t.p.). Franca paro sidanta antaŭ ni “dancis” rokenrolon sidante: ili duonleviĝis, duonturniĝis, manklakis. Aliaj, ne tiom spertaj, simple moviĝetis sur siaj seĝoj. Se tamen iu ekstaris, tuj alkuris gardisto kaj krude ordonis sidiĝon.

Memkompreneble ne ĉio estis malbona. Elstaris ekzemple la brilaj prelegoj de profesoro John Wells pri lingvistikaj temoj, la informriĉaj enkondukoj en la vivoj de Erasmo aŭ de van Gogh. La ekskurso al la malnova nederlanda vilaĝo “Zaanse Schans” kaj al Amsterdamo (kun ŝipveturo tra la urbaj kanaloj) plaĉis al ĉiuj partoprenantoj. El la muzikaj programoj ni menciis la kantadon de Elena Puĥova, la elpaŝon de la fama duopo Ĵomart kaj Nataŝa kaj la koncerton de

JoMo, kiu ne nur kantis, sed ankaŭ senĉese p'rimokis la aron de gardistoj, severe observantaj la publikon.

Ĉi-jare estis la 100-jara jubileo de UEA, sed multaj plendis, ke nenio interesa estis dediĉita al la jubileo. La vespera programo estis magra, eĉ dum la Internacia Festivalo, kiun partoprenas kelkcent homoj, oni havas pli riĉan vesperan programon, ol dum tiu ĉi UK, kie oni malmulton ofertis al la kelkmilhoma publiko.



La lastan tagon venis al ni anglino kaj indigne rakontis, ke la UEA-oficisto ordonis voki la policon, ĉar maljuna sveda esperantisto ne montris sian kongreskarton. Malgraŭ tio, ke oni poste ricevis lian kongreskarton, kaj multaj homoj atestis, ke li pagis la kongreskotizon kaj estas eĉ dumviva membro de UEA, la svedo estis forkondukita kiel krimulo al la policejo. Iu berlinano rakontis, ke ŝi vidis, kiel du pordistoj krude batforŝovis ŝian konaton, kiam li, ankoraŭ ne surmetinte la kongresŝildon, venis al la enirpordo de la kongresejo. Ni mem spertis, kiel en la libroservo oni aroge alkriaĉis homojn, kiuj nur demandis, pro kio tie la poŝtmarkoj estas pli kostaj ol en normalaj vendejoj. Enŝteliĝas la supozo, ke, se oni laboras en la CO, oni opinias sin apartaj uloj, kiuj rajtas trakti homojn senrespekte, eĉ humilige.

Kompreneble, tio estas nur kelkaj aspektoj, sufiĉe subjektivaj, sed ni kredas, ke ne nur ni, sed ankaŭ kelkaj aliaj, ne plu ŝatus partopreni UK-ojn. Tro negativa estas la bilanco: multe da elspezita mono, multe da malagrablaĵoj kaj malmultaj klerigaj, pozitivaj kaj vere interesaj okazaĵoj.

Lena Karpunina, Gerd Bussing (Rusio-Germanio)




La 17-an de septembro 2008 en la aĝo 62 jaroj post longdaŭra kormalsano mortis unu el veteranoj de la urba E-movado Vjaĉeslav Nikolajeviĉ Ivanov. Lerninte Esperanton en 1962, Vjaĉeslav Ivanov multe propagandis la internacian lingvon kaj instruis ĝin en Ivanovo. Li estis aktiva membro de la loka E-klubo. Ni funebras kaj kondolencas pro la forpaso de nia samideano.

Tatjana Loskutova (Ivanovo)

 kultúra revuo

TREMANTA STELO

Dina aperis en Esperantujo antaŭ kvardek jaroj. Tiam ŝi estis ĉarma studentino pri filologio kun rideto de Mona Lisa. Ŝi loĝis en la fora siberia urbo Barnaul, kie funkciis unu



el la plej amasaj junularaj esperantistaj kluboj. La klubo, prosperanta en la regiono, tiam preskaŭ sensamideana, havis la elokventan nomon “Oazo”. Ĝin fondis kaj gvidis Anatolo Gonĉarov, perfekte konata al la esperantistoj eĉ nun, kio liberigas min de la devo prezenti lin ĉi tie pli detale. Do en la ĉarma kompanio aperis tiu ĉarma knabino kun sia freŝa mondpercepto, kun siaj sinceraj sentoj, des pli – verkanta poemojn en la rusa. Normale, la impresoj de esperantista vivo trovis rimreeĥojn en ŝia animo, kaj nature tiuj reeĥoj iĝis poemoj jam en Esperanto.

Aroganta junulo, kia tiutempe estis mi, preninte gvidon de la poezia fako de SEJM, tuj skribis al kelkaj ekpoetoj. Per ties adresoj min afable provizis la klubgvidantoj, i.a. la sama Anatolo Gonĉarov. Mi celis kolekti materialojn por eventuala literatura revu(et)o, aŭ almenaŭ iel kunigi, interkonatigi la verkantajn homojn. La respondo de Dina atingis min tiom rapide, kiom permesis la tiama helika poŝto – post du semajnoj. Kaj – je mia miro – ĝi estis versa! Ŝi skribis:

Mi dankas vin sincere pro l’ atento,
Sed premas min konstante malkontento.
Mi ja ne estas vera verkistino,
Sed simpla ordinara junulino.
Do, ĉu daŭrigi indas la laboron?
Kaj je verkad’ apliki la fervoron?
Ja tutegale en la vivo mia
Atendos ĉiam min sukces’ nenia.
Talenton mi, verŝajne, ne posedas,
Neniu kredas min, kaj mi ne kredas.
Kaj, ĝenerale, ĉio estas vano.
Mi dankas pro l’ atent’, samideano.

La versoj estis absolute maturaj, sinceraj kaj kortuŝaj, do mi respondis ankaŭ verse. Mi skribis ion subtenan, kuraĝigan – tion, kion permesis mia aroganteco kaj tiutempa pruda edukado. Estas grava bonŝanco, ke tiu galimatiao tamen estis pli-malpli favore akceptita. Ekde tiam, do eĉ antaŭ nia persona konatiĝo ni komencis korespondi verse, kaj tiu versa dialogo daŭris dum kelkaj jaroj. Kelkajn monatojn poste ni ekvidis unu la alian en Esperanto-tendaro, en Karpatio. Tien Dina venis jam kun kelkaj kantoj, varme akceptitaj de la junularo, kaj jam kun malpli da duboj pri sia, laŭ mi senduba, talento. Ŝi vizitis kelkajn tendarojn – la tendaraj fajroj donis al ŝi specialan vivoforton, aron da brilaj poemoj kaj kantoj Dina verkis ĝuste pri kaj por Esperantujo:

Ĝus akirita energio
sufiĉas, ŝajne, eĉ por jar’,
sed esperanta nostalgio
turmentas min post la tendar’.
Esperantujo malproksima
Plej kara estas sur la ter’.
La vivo griza kaj kutima
Pensigas forte pri somer’.

La talento, ŝia natura doto, estis ne nur poezia, sed ankaŭ la tre rara kapablo emocii, kunigi kaj entuziasmigi homojn, elkapigi freŝajn ideojn pri bonaj agoj kaj efektivi ilin. Diplomiĝinte pri lingvoinstruado, ŝi dekomence trafis per ordinara distribuo de junaj fakuloj (kiel la plejmulto de tiamaj diplomiĝintoj) en la mez-lernejon de siberia vilaĝo Povaliĥa. Do al la Esperanto-kurso, kiun ŝi tuj organizis en la lernejo, venis cent dudek gelemantoj! Ŝi skribis al mi, ke, se ĉiuj ili iĝos esperantistoj, oni devos ŝanĝi la nomon de la vilaĝo al Esperantiĥa...

Poste, ankaŭ tre bonŝance, Dina trafis Leningradon, la kurson de famega kaj la plej estiminda fakulo pri poezia tradukarto, profesoro Jefim Etkind. Tion mi, verdire, opiniis ne la plej grava bonŝanco. La plej grava estis, ke, loĝante ne tre malproksime de la urbego, mi nun povis renkonti ŝin pli ofte. Nur vizitante, laŭ ŝia insisto, prelegojn de Etkind pri la franca poezio, mi ravite konjektis, ke estas grandega bonŝanco la apero mem de tiu persono en ŝia kaj en mia vivo. La profesoro krom tio estis iniciatinto kaj gvidinto de parolalmanako "La unuan fojon en la rusa". La almanako regule okazadis en Leningrada Domo de verkistoj kaj donis eblon al la plej eminentaj tradukistoj prezenti siajn freŝajn tradukojn al la kolegaro. Do ĝuste per zorgoj de Dina kaj dank' al bonvolo de profesoro Etkind en 1975 (imagu, kiam mem la vorto "Esperanto" estis fakte malpermesata!) esperantistoj dufoje ricevis tiun eminentan podion plus tiun eminentan publikon. Unuafoje Semjon Podkaminer kaj Vladimir Samodaj brile prezentis tradukojn el la rusa poezio en Esperanton. La duan fojon laboris Dina kaj mi, preparinte ruslingvajn tradukojn el la verkoj de konataj poetoj de Esperantujo. Ambaŭ prezentoj estis bone akceptitaj; certe, la eminentuloj ne iĝis samideanoj, sed almenaŭ konservis enanime estimon al la lingvo internacia, kiel lingvo arta.

Bedaŭrinde, pli-malpli baldaŭ ekis la fifama batalado de la ŝtato kontraŭ t.n. "disidentoj", personoj, kies opinio ne ĉiam kongruis kun la oficiala. Jefim Etkind estis enkalkulita inter tiuj kaj pelita for el Sovetio. Kompreneble, perdo de la patrujo estis dolora, sed multe pli dolora estis lia foriro por la patrujo mem. Liaj libroj pri poezia tradukarto, geniaj kaj unikaj instruiloj, estis malpermesitaj – tio bremsis evoluon de la rusa tradukista skolo, versimile, por jardekoj. Ankaŭ lia kurso estis dissolvita. Dina revenis en Siberion. Tamen ne por longe.

Ŝi trovis forton rezisti al la destino. Ŝi venis en Moskvon, sukcese ekzameniĝis kiel aspiranto en la



amikeca renkontiĝo dum vizito de D. Lukjanec al Moskvo; de maldekstre: Elena Puĥova, Garik Kokolija, Mikaelo Bronŝtejn, Vladimir Samodaj, Dina Lukjanec, Gennadij Ŝilo

Instituto de lingvoscienco de Akademio de Sciencoj de USSR kaj en 1983 brile doktoriĝis per defendo de la disertacio, esploranta esprimeblecojn de poeziaj tradukoj en Esperanto kompare al tiuj en naciaj lingvoj.

Jam dum du jardekoj Dina Lukjanec loĝas en la fora Kazahstano, en Almati, la iama ĉefurbo de la respubliko. Ŝi daŭre verkas poemojn kaj kantojn. Nuntempe ŝi kungvidas la Artan centron, produktante videopoemojn en la rusa, en la kazaha kaj en Esperanto. En 2007 ŝia kanto “La urbo ora” ricevis laŭdan mencion en Belartaj Konkursoj de UEA.

3.

Miaplaĉe, mi determinus tri ĉefajn temojn en la verkaro de Dina Lukjanec. Tiuj estas: Amo, Esperantujo, Vivo. Sed mi ne estus tro insistema, defendante tiun ĉi determinon en eventuala diskuto. Ĉar la tri temoj interplektiĝas – ja nature ne povus esti alie. La interplektiĝo estas rezulto de profundanima meditado, rezulto de kredo kaj dubo, feliĉo kaj plago, ĝojo kaj tristo, aspiro kaj embaraso.

Kekaj personoj, aŭdintaj la kantojn de Dina, serioze diradis al mi, ke ŝi estas perfidinta la ideon, ke ŝi “faras malbonon por disvastigo de la lingvo per tiuj kantaĉoj”:

Esperanto estas
La ideo profunda,
Tamen scii la fundon
Ĝian ne estas reale.
Pro tio mi hezitas
Propagandi ĝin.
Eraron mi evitas,
Komprenu min.
La lingvo estas dono
Por saĝul’ kaj fripon’,
Ĝi servas por la bono
Kaj por malbon’.

Kion mi respondu? Estas homoj komprenemaj kaj ne tre. Por la komprenemaj ne necesas klarigi, ke tiuj kantoj estas dolora cerbumado, meditado, normala por ĉiu persono, havanta cerbon. Por tiuj, kiuj ne komprenas, miaj klarigoj ne havus sencon. Nur unusolan aferon mi volus emfazi ĉi-rilate: ne eblas sen sincera amo diri la sekvantajn kortuŝajn vortojn:

Esperantujo, amata tero,
Naïve kredis mi, ke estas vi en vero!
Esperantujo, profundan amon
Al vi ĝis nun mi ĉiam sentas,
Sed adiaŭ, tamen...

Kaj jen la amo interhoma, la amo virina. Plena de travivaĵoj, feliĉaj kaj doloraj. Ĝena por paroli pri tiu sento en la poemoj kaj kantoj, montrotaj al flanko legantaro. Por kio? Do – por inspiri, por klarigi sian sentogamon, por montri la vojon al vera amo. Speciale ŝatante lirikan poezion en Esperanto, mi konatiĝis kun verkaro, ver-

simile, de ĉiuj esperantaj poetinoj intaj kaj antaj. Pro tio mi deklaru sen timo, ke tute ne multaj niaj poetinoj leviĝis en siaj poemoj al tiu alto de sincero kaj esprimriĉeco, kiun atingas Dina per tute simplaj vortoj:

Mi povus vivi sen angoro,
Forgesi baldaŭ pri l' aŭgust',
Sed ĉio vane, ĝemas koro,
Revema koro en la brust'.
Pro kio ofte mi sopiras
Kaj tremas kvazaŭ la foli'?'
Forgesu lin: racio diras,
Sed koro flustras: estu li!

Ĉu en la poemoj alitemaj, privivaj, kiujn mi, kompilante la libreton, tute arbitre apartigis en la parto "Trankvilo kaj silento", forestas la amo? Tute ne – ĝi enestas, laŭ mi, eĉ pli ol en la du antaŭaj partoj, ĉar temas pri la amo al la tuta homaro. Ne al abstrakta homamaso, sed al animriĉaj, prudentaj kaj honestaj homoj. Iom da belaj historioj. Iom da edifo – sen trudo, do tute akceptebla. Iom da laŭdo – por amataj lokoj sur la Tero kaj por la Tero mem:

Ho mia bela, bela Ter',
Raviga mia Tero multkolora!
Spirito dia plenplenigas vin.
Kreanta Volo plenplenigas vin.
Kaj vere estas sen la fin'
Ĉielo super vi kaj suno mola...
Ho mia bela, bela Ter'!

La modernaj espaj poetoj ne verkas tiel. Naskinte en la kapo freŝan penson, foje eĉ brilan kaj originalan, moderna poeto ne komplikas por si la vivon per serĉado de freŝaj rimoj, konvenaj por tiu penso, aŭ per zorgoj pri ia bela metriko. Senrimaj kaj senritmaj linioj, kunmetitaj kolonete, havas la nomon "poemoj". En la poemaro de Dina Lukjanec vi ne trovos tion. Kontraŭe – vi trovos la rimojn elegantajn, perfektajn, tute konvenajn kaj ĝustaloke metitajn. Iu rafinita leganto eble plendos kelkloke pri la metriko – ne ĉiam kutima kaj rigora. Sed plejparte tio okazas en la kantotekstoj, kie ja endas konsideri ankaŭ la melodion... Kaj ne nur. Siajn novajn verkojn Dina nomas "Videopoemoj", enplektante la brilajn tekstojn kaj ĉarmajn melodiojn en filmojn kun aro da ravaj bildoj – aludaj, alegoriaj, inspiraj. Mi esperas, ke pli-malpli frue ankaŭ tiuj videopoemoj atingos vin, kara leganto. Sed dume – ĝuan legon!

Mikaelo Bronŝtejn (Tihvin)

BULGARA E-TEATRO – 50-JARA

Fondita en 1958, Bulgara Esperanto-Teatro (BET) festas sian duonjarcentan jubileon. La solenaĵo okazos en la salono de la Urba biblioteko en Sofio la 16-an de oktobro. Por la novaj esperantistoj, kiuj ne konas la agadon de BET, jen koncize:

El la biografio de BET:

1958 – BET fondita sub la aŭspicio de Bulgara Esperanto-Asocio (BEA).
 1958 – La unua partopreno en nacia kongreso de BEA. Ĝis 1997 okazis prezentadoj en ĉiujaraj E-kongresoj naciaj.
 1959 – La unua partopreno en UK de Esperanto. Ĝis 1997 okazis prezentadoj dum 23 Universalaj Kongresoj.
 1964 – La unua partopreno en kongreso de TEJO. Ĝis 1997 okazis prezentadoj dum 4 kongresoj de TEJO.
 1972 – La unua partopreno en kongreso de IFEF. Ĝis 1997 okazis prezentadoj dum 4 kongresoj de IFEF.
 De 1970 ĝis 1983 ekzistis ankaŭ teatra grupo de elstaraj bulgaraj aktoroj sub la gvidado de Kiril Draĵev.
 1989 – Grupo de aktoroj el Teatro de la Junularo en Sofio formis la novan konsiston de BET. BET prezentiĝis per siaj spektakloj antaŭ miloj da spektantoj en dekoj da landoj.

Reeĥoj pri BET:


“Entute neforgesebla evento en mia esperantista vivo!” (Prof. G. Waringhien).
 “La Bulgara Esperanto-Teatro estas fiero ne nur por ni, parolantoj de Esperanto... Per sia agado BET bonege prezentis la bulgaran teatran arton antaŭ internacia publiko.” (Prof. H. Tonkin)
 “La internacia publiko el 58 landoj apenaŭ povis reteni siajn larmojn... profunde emociita de la majstra arto de la bulgaroj...” (S.M.)
 “Ĉiuvidepunkte perfekta prezento, scenografio, aktorado, reĝisorado, prononcado.” (Aldo de’ Giorgi)
 “Nova perlo aldoniĝis al la koliero de via repertuaro.” (Carlo Minnaja)

Partoprenis en BET: Belka Beleva – Honora membro de BEA, Honora membro de UEA; Kiril Draĵev – tradukisto de dramverkoj, Honora membro de BEA, Honora membro de UEA; Kunĉo Vălev – tradukisto de dramverkoj, Honora membro de BEA; Anani Anev; Angelina Sotirova; Darinka Goranova; Gerasim Mladenov; Gertruda Lukanova – reĝisoro; Georgi Kerelezov; Ivan Zlatarev; Ivanka Mileva; Iskra Radeva; Kosta Conev; Konstantin Dimĉev; Krikor Azarjan – reĝisoro; prof. Krestju Mirski – reĝisoro; Luna Davidova; Margarita Duparinova; Miĥail Ĉobanov; Miĥail Zdravev; prof. Mois Benieŝ – reĝisoro; Maja Uzunova – scenografo; Nikola Petkov – reĝisoro; Nikolaj Uzunov; Nikolaj Binev; Nikolaj Klisurov; Nikolaj Ivanov; Olga Popova; Petar Vasilev; Petar Vuĉkov; Stefka Proĥaskova – reĝisoro; Teo Jurukov – aktoro kaj reĝisoro; Veneta Zjumbjuleva; Valentina Borisova.

Spektakloj (neplena listo): 1958 – Unua spektaklo – Br. Nuŝiĉ, P. Javorov k.a.; 1959 – “Ĉasantoj de oficoj” – Ivan Vazov; 1960 – “Komedio de eraroj” – Ŝekspiro; 1964 – “Edziĝpropono” – A.P. Ĉeĥov; 1966 – “Urso” – A.P. Ĉeĥov; “Dio absolvu” – Elin Pelin; 1968 – “Akridoj” – St.L. Kostov; 1970 – “Virina regno” – Anton Straŝimirov; 1971 – “Mandragora” – Machiavelli; “Kara mensoganto” – G. Kilti; 1974 – “La rozoj” – A. de Benedetti; “La razisto de Sevilla” – Beaumarchais; 1975 – “Servisto de du mastroj” – C. Goldoni; 1976 – “Lernejo de virinoj” – Moliere; 1977 – “La ventmuelejo” – Elin Pelin; 1978 – “Megero” – Anton Stra-

ŝimirov; 1979 – “Amo” – laŭ Paul Gerald; 1983 – “Malnovmoda komedio” – A.Arbuzov; “Epifanio” – Ŝekspiro; 1984 – “La milionulo” – Jordan Jovkov; 1985 – “Aŭsburga kretocirklo” – laŭ B.Brecht; “Tri virinoj en la neĝo” – laŭ Erich Kästner; 1987 – “La kaverno de Salamanca” – Cervantes; “Pikniko sur batal-kampo” – Fernando Arabal; 1988 – “Fabelo pri kalpakoj” – P.Panĉev; 1989 – “Lanĉo” – Emilija Lapenna; 1990 – “Mi ne plu konas vin” – A. de Benedetti; 1992 – “La gastejestrino” – C.Goldoni. Kiel Teatrofako de LF-Kooperativo: 1995 – “Triptiko” – Giorgio Silfer; 1997 – “Espere Despere” (tri unuaktaj dramoj).

Mariana Evlogieva (Bulgario)



NOVA ROMANO DE NEMERE

En la E-eldonejo “Impeto” aperis nova originala romano de la fama hungara kaj Esperanta verkisto István Nemere “Vismar”. István Nemere estas tre populara kaj fekunda aŭtoro. Li verkis pli ol 500 librojn en la hungara kaj dekel-kajn – en Esperanto. Lian verkaron karakterizas la simpla lingvaĵo kaj klara stilo. En la nova romano temas pri Vismar, neĵuna viro kun tragika pasinto, solulo, kiu tamen helpemas por ĉiu. La Hundo, kiu malhavas la nomon, travivis teruraĵojn – kaj jen, ili du renkontiĝas. Ĉu povos naskiĝi vera amikeco inter homo kaj besto?

SES LIBRONOVAĴOJ DE UEA


Dum la 93-a UK en Roterdamo la Eldona Fakto de UEA prezentis kvin tute novajn librojn kaj unu reeldonon. La jubileo de UEA kaj la okazigo de la UK en ĝia hejmurbo katalizis pli multnombrian samtempan lanĉon de novaĵoj ol kutime.

Okaze de la 100-jariĝo de Universala Esperanto-Asocio aperis *Utila Estas Aliĝo*, 126-paĝa abunde ilustrita libro de la renoma movada historiisto Ulrich Lins. Sian titolon ĝi transprenis de iama varbreklamo de UEA. La libro estas interese-skapta enkonduko en la eventoplenan historion de UEA kaj nepre rekomendinda kiel kleriga legaĵo. Krom la ĝenerala historia trarigardo *Tra la unua jarcento de UEA*, ĝi enhavas artikolojn pri Hector Hodler, la fondinto de la Asocio, kaj pri Ivo Lapenna, la konstruinto de la moderna UEA. La libron kompletigas listoj de la prezidantoj kaj direktoroj de UEA kaj de la redaktoroj de *Esperanto*, laŭjara kroniko de la Esperanto-movado kaj bibliografio. Temas pri grafike alloga eldonaĵo kun pli ol 100 fotoj, inter kiuj multaj tre maloftaj.

Humphrey Tonkin verkis libron, kies ĝenro surprizas tiujn, kiuj konas lin kiel aŭtoron pri tute alispecaj temoj. *Tuj apude*, 56-paĝa, estas gvidilo pri la najbaraĵoj de la Centra Oficejo en Roterdamo, konata al Tonkin pro vizitoj dum preskaŭ kvin jardekoj. *Mi ĉiam estis scivolema pri la historio de la kvartalo en kiun la hazardo deponis UEA*, li diras. *Tiu ĉi eta gvidilo estas frukto de tiu scivolemo kaj de miaj lastatempaj promenadoj. Ĝi celas ne doni ĉiujn detalojn pri konataj lokoj, sed ĉefe atentigi pri tiuj aferoj, kiujn alikaze la vizitanto al nia oficejo preteratentus, kaj viviĝi la historion por faciligi la kontakton inter vizitantoj kaj la ĉirkaŭaĵo.* Por la

libro kunlaboris du loĝantoj de la kvartalo: ĵurnalisto kaj urba historiisto Peter Bulthuis – nepo de la Esperanta verkisto H.J.Bulthuis – kaj Francisco Veuthey, kiu dezajnis la libron.

Louis Couperus (1863-1923) estas nederlanda verkisto, kiu ĝuis ankaŭ internacian famon komence de la 20-a jarcento, sed kies verkoj poste ial falis en forgeson por pluraj jardekoj. Lastatempe li estis remalkovrita, kaj liaj verkoj estis filmitaj por televido kaj kino. Tiu renesanco etendiĝis ankaŭ al Esperanto, konvene ligo kun UK en Nederlando. La eldonejo Kava-Pech lanĉis lian romanon *Fatalo* kaj UEA mem – reprezentan kolekton de rakontoj titolitan *Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj*. Ambaŭ estas tradukitaj de akademiano Gerrit Berveling. La rakontaro donas bonan bildon pri la multflanka verkaro de la majstro, kies paletro variis de la Romia Imperio tra psikologie-realismaj verkoj ĝis mitologiaj romanoj, ĝenro, kiun li inventis.



En *Naturaj vortordoj en Esperanto* Wim Jansen, estro de la katedro pri interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo, resumas temojn de sia doktora disertacio. Surbaze de la funkcia gramatiko li priskribas kaj klarigas la observeblan ordigon de subjektoj, objektoj kaj adjektoj en frazo kaj tiun de adjektivoj en substantiva vortgrupo, kaj esploras sintaksajn aspektojn de la negacio en Esperanto. La konkludo, ke la trajtoj de Esperanto, establitaj en tiu ĉi laboro, konformas al fasko da universalaj propraĵoj de la homa lingvo, subtenas la konstataĵon pri la natureco de nia lingvo. La 40-paĝa verko celas interesitojn pri la gramatiko kaj helpi al instruistoj, kursestroj kaj aŭtoroj de lernolibroj.

La kajero *Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA* estis de longe nehavebla, sed dum UK surmerkatigis ĝia tria eldono, 39-paĝa kaj funde reviziita. Temas pri gvidilo por la elementa kaj meza niveloj de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA kun priskribo de iliaj celoj kaj historio, detala prezento de la postuloj kaj de la regularo, kaj kun specimenaj testoj. Jam ekde la jaro 1997 al la kongresa librorikolto apartenas ankaŭ la IKU-prelegaro. La 115-paĝa kajero *Internacia Kongresa Universitato 2008* enhavas la tekstojn de ĉiuj prelegoj de la 61-a sesio de IKU pri tre varia temaro en redakto de J.A.Vergara.

Kiel por ĉiuj eldonaĵoj de UEA, ankaŭ por la supraj novaĵoj la Libroservo de UEA donas rabaton de 1/3 ekde samtempa aĉeto de minimume 3 ekzempleroj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Mikaelo Bronŝtejn

La urbo Goblinsk¹

05. 03. 199...

Ekde frumateno ventego ludis neĝerojn en la stratoj. La flokoj de neĝo estis enorme grandaj, pezaj, neludemaj sed dense falontaj teren, se la ventego ne kaptus ilin duonvoje por kirli, peli, flugigi preskaŭ vertikale kaj ĵeti en la vizaĝojn de paŝantoj. Kvankam Seniĉkin haltis la direktoran “Volgon”² laŭeble pli proksime al la enirpordo de la urbodomo, Viktor Sigaev elaŭtiginte tuj ricevis neĝofrapon en la vizaĝon. Kun kurta blasfemo li ĵetis rigardon al la brakhorloĝo, ŝirmis la vizaĝon per gantumita manplato kaj nelerte ekkuris laŭ la glita ŝtuparo. Li estis malfruanta, la urbestro Petrovskiĥ fiksas la aŭdiencon por la naŭa tridek.

“Sekretariino de l’ urbestro estas vizaĝo de la urbo” – Viktor rememoris ĉi tiun deklaron de Artur Petrovskiĥ, enirante la akceptejon de la urbestra kabineto. Efektive, Evelina Pavlovna posedis ĉion necesan por roli la urbvizaĝon. Viroj, vizitantaj la urbestron, englutadis salivon ĉe avida gapado al la ĉarmega tridekjaraĝa kapeto kun bunta blonda frizaĵo, svelte elstaranta vertikale super la sekretaria tablo inter telefonoj kaj florbukedoj, kiujn konstante kaj abunde donacadis al ŝi la sama viraro. La kapeto instaligis sur varmamarmora koltigo, kreskanta el la bluzo, dekoltita deĉe, konforme al la posteno, kaj tamen montranta la ekdisduigon de ambaŭ ĉefaj riĉaĵoj, elstarantaj horizontale super la sama tablo. Eble ne ili estis la ĉefaj, sed ceterajn la tablo kaŝis, kaj tiu obstaklo nur donis pretekston por libere kaj dolĉe fantazii, enamiĝante. Viktor, havanta imagon ankaŭ pri la karaktero de la sekretariino, restadis ekster la enamiĝintoj, tamen, ĝuste pro la karaktero, li emis subtenadi kun ŝi la rilatojn stabile bonaspektajn. Li malfermis la tekono, kaj enmanigis al la ĉarmulino skatoleton da “Trufoj”.

- Plezurajn festotagojn, Evelinjo Pavlovna! – li elmurmuris ĉe tiu ago, plimalpli familiare kisetante ŝian vangon.
- Ah, dankon, Viktor Vasiljeviĉ! – ŝi pepetis responde per voĉo tiom anĝela, ke neniu supozintus pri ties kapablo elparoli ankaŭ krudajn vortojn. – Mi timas perdi la plezuron de tiuj festotagoj – la postaĵo kungluiĝos pro tia kvanto da bombonoj!
- Ha-ha-ha! – ĝentile reriditis Viktor. – Ĉu la mastro ĉeestas enbutike?
- Iru, iru, li jam atendas vin, – distrite diris Evelina Pavlovna, ordigante la frizaĵon.

Viktor malfermis la unuan pordon, akurate fermis ĝin, englitinte la interpordejon, kaj same akurate malfermis la duan pordon.

- Eniru kuraĝe, kial do ci ŝtelrampas?! – la obeza korpego du metrojn alta

¹ Ĉapitro el la nova romano. Aliaj ĉapitroj el tiu ĉi verko estis publikigitaj en REGO №№ 3 (40) kaj 3 (46). (La red.)

² “Volgo” – aŭto, produktita dum Sovetio en la urbo Gorkij (nun – Niĵnij Novgorod).

basvoĉe ekhurlis en la angulo de vasta kabineto.

- D-do, Artur Albertoviĉ... mi ne volas malhelpi – eble vi iun gravan aferon solvas nun... – envoĉigante necertecon kaj estimon respondis Viktor.
- Kion? – bonvole miris la korpego. – Ha, jes! Vin atendente, mi jam unu pokaletan ĵus konsumis! Animo petis... proksimiĝu, Viktór, la dua jam pretas por mi sed ankaŭ por vi estas plenigita...

La korpego montris per dikfingro en la ŝrankon, apud kiu li estis staranta. Tie videblis botelo, ne plu plena, plado kun vinberoj kaj du pokaletoj, plenigitaj per helbruna likvaĵo.

Artur Albertoviĉ Petrovskiĥ iĝis la dua sekretario de la Gorkomo¹ ĝuste ĉe la fino de la partio. Duonjaron poste la ŝtatprezidento abrupte decidis dissolvi la partion per sia ukazo. La plej grava partiulo – la unua sekretario de la Gorkomo – estis oferita por pendigi sur lin ĉiujn pekojn de la antaŭa administro. Kaj la grandega, sed ne tiom rimarkata antaŭe, figuro de Artur Petrovskiĥ, tute senpeka en la imago de l' urbanoj, iĝis taŭga por okupi la reinventitan urbestran postenon. Certe, per saĝe organizita tuturba balotado...

Cetere, Artur Albertoviĉ ne estis novico en la administra sistemo – dum multaj jaroj li, sen ascendi la karieran ŝtuparon, okupadis la postenon de la tria sekretario. Do li estis senpera gvidanto de Viktor Sigaev, kiam tiu estris la propagandan fakon de la Gorkomo. Kaj ĝis nun la gvidanto konservis ĉiujn kutimojn rilate al la iama subulo: nomi tiun Viktór, akcentante la lastan silabon, regali per ĉiamĉeesta konjako kaj amikeme frapi la ŝultron ĉe l' renkontoj. La lastan kutimon Viktor ne ŝatis, ĉar ĉiukaze li devis delikate mildigi la fortegan frapon, alie li estus faligita planken. Ankaŭ nun, alirinte la urbestron kaj kaptinte la momenton, kiam tiu eklevis la dekstran manon por frapo amika, Viktor lerte leviĝis sur piedpintojn kaj ricevis baton, kiu ankoraŭ ne akumulis la tutan forton. Trejnite li tuj reprenis normalan starpozicion tiel, ke Petrovskiĥ ne kaptu lian manovreton, kaj kulpavoĉe diris:

- Artur Albertoviĉ! Indulgu min hodiaŭ! Tuj de vi mi devas hasti al mia planumo!
- Do? – la grandaj brovoj de Petrovskiĥ mire leviĝis super la ruzaj okuletoj. – Ĉu glaseto da bona konjako faros viajn insultojn nekompreneblaj por la subuloj?
- La aŭtoritato eklamos, Artur Albertoviĉ... Ja iam vi mem instruis...
- Iam – tiam estis alia tempo! – rebatis la urbestro. – Sed nun ni venis en la epokon, kiam la stato ebrieta estas eĉ salutinda. Ne ofendu min, Viktór, mi petas!

Viktor neniom emis ofendi lin, do etendis la dekstran manon al la pokaletoj kaj prenis kelkajn vinberojn per la fingroj de la maldekstra. Levinte la kapon supren por humile enrigardi la okulojn de Petrovskiĥ (la urbestro insistis, ke ĉe tostado la rigardoj devas renkontiĝi), li duonsolene elparolis:

- Okaze de la venanta virina tago – je la sano de via edzino!

¹ Gorkomo (laŭ ruslingva kurtigo) – Urba komitato de la Komunista Partio

- Be! Lasu tion, Viktór, – sufiĉas, ke ŝi jam dum semajno segas min: kion kaj kion mi donacos al ŝi por festotago?!! Ni trinku je la kapablo de ĉia kapo – se ĝi agos prudente, ĉi gajnos ĉion, se ne – ĉia kapo taŭgas nur por manĝi kaj blasfemi...
- Mi petas, Artur Albertoviĉ... ne komencu de enigmoj... Kian gajnon mi povas esperi en la nuna bordeltempo?
- Trinku, trinku! Ĝuste la bordeltempo taŭgas por akapari gajnaĵojn.

Ili malplenigis la pokaletojn, kelkmomente senparole maĉis vinberojn, poste la urbestro, dirante “Dio aprobas la triopon”, plenigis por si ankoraŭfoje, fortrinkis kaj invitis la gaston sidiĝi. Vigle okupinte la unuan seĝon ĉe longa porkunsida tablego, Viktor gapis dum la korpego estis instalanta sin en la urbestran brakseĝon, peze respirante kaj levante al li siajn borantajn okuletojn por longa esplora rigardo. Ĉio ĉi daŭris kvin minutojn aŭ pli, sen aŭgurebla fino, kaj la nervoj de Viktor jam estis streĉitaj ĝislime, sed eĉ per eta movo de vizaĝmuskoloj li ne montris tion, nur faris surseĝe moveton per la postaĵo, kvazaŭ ordigante la pantalonon. Finfine Petrovskiĥ ekparolis.

- N-nu, Viktór, diru al mi por komenco, ĉu ci kontrolas, kiuj el la uzinanoj jam ricevis vaŭĉerojn, kiuj intencas akciigi la siajn ekster “Rusoplast”... kiuj jam vendis aŭ ŝanĝis kontraŭ vodko? Ha?

La okuloj de Artur Albertoviĉ kvazaŭ tiradis la animon. Sed Viktor, ricevinte la temon, jam estis preta por la ludo, do mienigis embarasiĝon.

- Pardonu, mi ne tre bone komprenas, kial mi devas tion kontroli... – li respondis, plenigante la voĉon per sincera hezitemo. – Mi scias, ke la privatigoj ekos baldaŭ, tamen ja dume nenion oficialan...
- Nu, ne komprenas, do ne komprenas... – daŭrigis Petrovskiĥ kvazaŭ indiferece kaj maĉetis la lipojn por post momento produkti abruptan ekmuĝon. – Ne komprenas li! Tiuj, kiuj komprenas, jam gvas la ricevintojn tuttage ĉe la vaŭĉerejoj! Gvas kaj al ĉiu proponas vendi la vaŭĉeron! Se ci ne scias pri tio, mi hontas pro ci!
- Mi scias! Mi scias! – kvazaŭtime, hasteme duonflustre ekkrietis Viktor. – Sed ja malmultaj vendas – ĉiuj atendas evoluon de la eventoj. Ja oni avertis eĉ per amaskomunikiloj, ke ne endas hastado... ke la homoj paciencu, atendu... ke eble post monato aŭ du... tiuj vaŭĉeroj kostos du “Volgojn”!..

Petrovskiĥ explore enrigardis liajn okulojn kaj subite palpebrumetis ruze, konspire.

- Du “Volgojn”... – elspiris li senŝarĝiĝinte. – Ah, ruzulo! Mia skolo! Vidu, se vi ne estus dirinta pri tiuj promesaŭtaĉoj, mi preskaŭ kredus vin esti ŝtipulo... Ho-ho-ho! Kiaj sinceraj okuletoj! Mia skolo! – ripetis Petrovskiĥ kontente. – Do vi jam estas informita pri ĉio, ĉu ne?
- Kompreneble, ne pri ĉio, Artur Albertoviĉ, – respondis Viktor kun sama konspira palpebrumo. – Sed inter kelkaj variantoj de privatigo, baldaŭ proponotaj al la profanaro, pardonu – al la civitanoj – mi elektus la unuan. Por ke kvindek unu procenton de la tuta akcia stoko posedu la kolektivo de “Rusoplast”... kaj... se vi afablos helpi min... mi ŝatus aĉeti ankaŭ... ankaŭ iom da akcioj el la restinta kvanto. Ja tiu kvanto estos vendata aŭk-

cie kaj ne ie ajn, sed en la urbodomo, ĉu ne?

- Ĉu mi prenu plian pokaletan?... – Petrovskiĥ demandis sin mem. – Ne, mi ne prenu. Post vi venos tiu... verserĉanto, nu vi konas lin... ne gravas. Sed mi devas sidi iom for de li. Do... – liaj okuloj denove ekboris la gaston, – ĉi, Viktór, decidis iĝi posedanto de “Rusoplast”!
- Dio savu, Artur Albertoviĉ, ne mi – la kolektivo estos posedanto! – oponis Viktor kun ne tro certa voĉardo.
- Hej, ĉe-esu, bubo! – etendis la voĉon Petrovskiĥ. – Mi ja vidas, ke vi scias ĉion plej gravan... La distrikto estas ne tiom vasta, ke ne atingi min raportetojn, ke via rufulo, e-e, tiu kiu iam estis komsomola sekretario... nu – helpu min!
- Pri kiu vi...? – demandis Viktor, iel-tiel daŭrigante la ludon. – Ĉu pri Serov? Do li okupiĝas pri siaj oficaj taskoj – serĉas klientaron, vendas sitelojn, kombilojn...
- Scias mi, kion li serĉas, via Eŭgeĉjo... – elgrumblis la urbestro. – En unu kaserolo ni ĉiuj estis kuirataj. En vilaĝoj via Eŭgeĉjo aktive elaĉetas vaŭĉerojn de lokaj kamparanoj – ja jes, kontraŭ siteloj, kombiloj... Jen estas nun lia ĉefa ofica tasko – por vi li aĉetas... Nu!?

Viktor elmienis kulpon kaj penton.

- Do jes... estas certaj planoj... Artur Albertoviĉ, mi kalkulas ankaŭ je via helpo... negranda sed afabla helpo... Pri tiuj kvardek naŭ procentoj, kiujn vendos la urbodomo aŭkcio... ĉu eblas esperi?... Ja vi bone konas min, – li daŭrigis petvoĉe, – ni povas paroli pri certa parto de la profito...
- Ha-a! – elmuĝis la urbestro. – Certe, mi konas vin, Viktór, bonege konas. Post kiam vi ricevos la uzinon, vi tuj forgesos eĉ la familinomon de Artur Albertoviĉ... eble eĉ la manon ne levos por saluto.
- Aj, gravan pekon vi pendigas sur min, Artur Albertoviĉ! – La lipharpintoj de Viktor ofendite malleviĝis. – Tute maljuste vi traktas... mi estas via disĉiplo kaj mi tion ĉiam memoros.
- Ĉu vere memoros? – Artur Albertoviĉ senfide duonfermis la okulojn. – Bone, se tiel, sed diru, Viktór, kial vi ne volas elekti la varianton pli sekuran – fondi fermitan akcian societon, kaj distribui la akciojn nur inter la viajn?... La unua varianto enhavas kelkajn danĝerajn momentojn, kaj ĉe certa situacio mi ne povos interveni kaj savi vin...
- Savi? De kio savi? Kia danĝero? – rapide demandis Viktor, streĉiĝante.
- Nu... ĉio povas okazi. Ekzemple jen – super ĉiuj atendoj al la aŭkcio por tiuj kvardek naŭ procentoj de “Rusoplast” venos kelkaj aĉetantoj krom vi kaj la rivalo, kiun vi subŝovos. Kion vi faros tiuokaze?

Viktor elmontris la plej sinceran kaj bonaniman rideton, kiu signifis gravan miron kaj nekomprenon.

- Artur Albertoviĉ! Se la aŭkcio anoncos nur la informjurnaleto de la urbodomo, ĉu multaj scios pri ĝi? Kaj entute, kiu bezonus tiun uzinaĉon? Muldmaŝinoj – malmodernaj, krudplasto – multekostaj, produktaĵoj – pene vendeblaj... nur kapdolorojn konstantajn ricevus la posedanto!

- Ha-a! – refoje elmuĝis la urbestro. – Sed por vi persone tiuj kapdoloroj ŝajnas agrablaj, ĉu ne?
- Mi... mi kutimiĝis, – modeste klinis la kapon Viktor.
- Do bone, ni vidu poste. – diris Petrovskiĥ paceme. – Dume okupiĝu pri tiu varianto, kiun vi elektis, – vi ne havas tro da tempo. Kaj sciuj: se vi malgajnos, vi senrevigos min, mia disĉiplo... kaj ne kulpigu min poste.
- Kompreneble, Artur Albertoviĉ! – respondis Viktor entuziasme. – Ĉu mi rajtas foriri?

Petrovskiĥ permeso mansvingis. Viktor leviĝis, prenis sian tekono kaj direktis sin al la pordo, sed jam ĉe la pordo li haltis, kvazaŭ rememorinte ion.

- Artur Albertoviĉ... – li diris, turninte la kapon.
- Jes? – demandrespondis tiu, tenante la montrofingron ĉe la butono por voki la sekretariinon.
- Ĉu vi jam scias pri tiu skandalo skribaĵo sur la urboŝildo?
- Ha, Cvetkov, la milicestro, raportis, ke estas jam reordigita. Nur du tagojn restadis tiu fiaĵo, feliĉe, la gravuloj el Piter dum tiuj tagoj ne preterveturis... Sed klarigu, Viktor, al la olda, nekompetenta ulo, kion signifas tiu vortaĉo “goblin”?
- Mi rigardos en la enciklopedio kaj tuj telefonos al vi. Ĉu taŭgas? – diris Viktor malfermante la pordon.

Jakobo – judo el Pollando, kiu nun loĝas en Novjorko, – estis komercisto, vendanta ŝtofojn. Li ne havis specialajn problemojn, krom najbaro, kiu estis granda antisemito. Iun tagon la najbaro alparolis lin:

“He, hebreo, mi aĉetos de vi pecon da ŝtofo oranĝkolora, tiom longan kiom la distanco inter la pinto de via nazo kaj la pinto de via ‘organo’.”

Tio tute ne ĝenis Jakobon, sed li klarigis: “Bone, tamen unue mi petas, ke ni subskribu kontrakton.” En ĝi li skribis: “Mi, Jakobo, morgaŭ liveros pecon da ŝtofo tiom longan kiom la distanco inter la pinto de mia nazo kaj la pinto de mia ‘organo’.”

La najbaro subskribis ĝin. La morgaŭan matenon, ĉe la pordo de la najbaro, la bruoj de pluraj ŝarĝaŭtomobiloj batis liajn orelojn. Kiam li malfermis la fenestron, li vidis antaŭ la pordo de lia hejmo kaj laŭlonge de la strato dekojn da ŝarĝaŭtomobiloj. De la unua elstaris oranĝkolora ŝtoforulo, kiu daŭris en la sekvaj veturiloj. Ĉe la pordo atendis lin transportisto kun fakturo je 150 000 dolaroj.

La furioza najbaro demandis al Jakobo: “Judo, kion vi faris? Konkrete mi ja diris al vi: peco da ŝtofo, kiu longe iras de la pinto de via nazo al la pinto de via ‘organo’!”

Jakobo respondis trankvile: “Sed vi devas scii, ke ekde la aĝo 8 tagoj la pinto de mia ‘organo’ restis en Pollando...”

juda anekdoto de Josef Shemer